



## REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. — Redaktas Dr Stan. Kamarýt.

### Ctnost trpělivosti

Někdy slyšíme od starých esperantistů, jmenovitě od těch, kteří opustili aktivní účast na hnutí, zda naše práce přináší skutečný úspěch, zda hnutí opravdu se přiblížilo nějakým způsobem k svému cíli. Po překvapujících úspěších, které esperanto získalo na přelomu století, zdá se jim, že doba mezi dvěma válkami znamenala stagnaci a nyní se jim nezdá, že hlásíme významné úspěchy.

Zapomínají na jednu významnou věc. Po první světové válce téměř zmizela třída měšťáků. S ní zmizela téměř úplně možnost měšťanského dobrosrdečného mecenáše hnutí. Kapitalista taková usilování, jako je naše, nepodporoval. Jemu vadila už lyrika naší „vnitřní ideje“. Hnutí musilo se mezi dvěma válkami zařídit na život z vlastních prostředků. A že to provedlo, je jedním z velikých dokladů jeho životnosti.

Druhá světová válka způsobila, že význam Evropy jako činitele ve světové kultuře velice poklesl. A my jsme přece pracovali hlavně nebo převážně v mezích evropské pospolitosti a hašteřivosti. A třída buržoasní zmizela docela.

A přesto zijeme. A esperanto se mezitím stalo jazykem daleko rozvinutějším než bylo před válkami a dokonce jednotnějším přes své stále rostoucí užívání a pronikání do Japonska a Číny na jedné straně a do latinské Ameriky na druhé straně.

A vedle organizace „neutrální“ zesílila ideově i počtem organizace dělnických esperantistů, sdružující s propagací esperanta šíření socialismu a všeobecné sociologické vzdělávání svého členstva.

Splnil se dokonce sen esperantistů prvního sledu: vlády se konečně zajímají o naše hnutí. Ovšem zatím vět-

šinou negativně. Zakazují je italští fašisté, němečtí nacionalisté, portugalské diktátory, španělské falangisté. A vlády pokrokové mají tolik zájmů s přestavbou společnosti, že zatím nemohou k esperantu zaujmout žádného stanoviska.

Ani projevy prominentů pro esperanto nepůsobily nikterak na růst hnutí. Vydali jsme svého času 4 stránky takových prohlášení; četli je asi jen esperantisté.

Rada mnohých zklamaných nadějí, jež se upínaly k takovýmto přeceňovaným podnětům, způsobila, že někteří esperantisté i jiní stoupenci myšlenky pomocného mezinárodního jazyka přišli k přesvědčení, že vada na pomalém šíření esperanta je v něm samém a pokoušeli se urychlit obecné zavedení pomocného jazyka reformami esperanta nebo nabízením jiného umělého jazyka, sestaveného však vždy po vzoru esperanta.

Chyběla jim ctnost trpělivosti. Neboť všechny tři uvedené příčiny nespokojenosti jsou omylné:

Otázka pomocného mezinárodního jazyka nebude řešena ani rozhodnutím vlád, ani usnesením nějakých akademii, ani doporučením slavných filosofů nebo matematiků. Pomocný jazyk zavedou jen esperantisté sami. O každý pokrok společnosti se muselo bojovat, také o mezinárodní jazyk se bojuje a bude se bojovat. Stejně socialismus nebyl nadiktován vládami, ale vybojován socialisty. Že to bude boj vítězný, pro to je dokladem skutečnost, že pochodeň od nás, již jsme prožili život jako esperantisté, přejímá už generace nová. Bude mít úkol snažší i těžší než my. Ale prostý fakt, že ta generace tu už je, je zárukou, že hnutí esperantské nemůže zaniknout. Nelze si představit, jak by mohlo zmizet s povrchu země, když jsou esperantisté po celém světě. Jen trpělivosti je třeba nám všem, ovšem více vám mladým než nám starým.

S. K.

### Karel Čapek: Aleksandro la Granda

Al Aristotelo el Stagiro,  
direktoro de la liceo en Ateno.

Mia granda kaj amata instruisto, kara Aristotelo!

Longe, tre longe mi ne skribis al vi; sed kiel vi scias, mi estis tro okupita pri aferoj militaj kaj kiam ni marŝis tra Hirkanio, Drangiano kaj Gadosio, kiam ni estis konkerantaj Baktrion kaj avancis trans Hinduson, estis nek tempo nek emo ekpreni plumon. Nun mi jam estas kelkajn monatojn ree en Susa; sed denove estis super la kapo da zorgoj kun administrado, kun nomumo de oficistoj kaj kun likvido de ĉiaj intrigoj kaj ribeloj, ke mi ĝis hodiaŭ ne venis al tio skribi al vi ion pri mi. Vere, vi proksimume scias el oficialaj raportoj, kio okazis; sed kiel mia sindono al vi, tiel mia konfido al via influo je kleraj rondoj helena min stimulas, ke mi denove refoje malfermu mian koron al vi kiel al mia respektata instruisto kaj spirita gvidanto.

Mi memoras, kiel antaŭ jaroj (kiom longe ĝi jam ŝajnas al mi) mi skribis al vi stultan kaj entuziasman leteron su-

per tombo de Aĥilo; tio estis sur sojlo de mia persa ekspedicio, kaj mi tiam ĵuris, ke mia modelo por la vivo estos la brava Peleido. Mi revis nur pri heroeco kaj grandeco; mi jam havis post mi venkon en Trakio kaj pensis, ke mi marŝas frunte de miaj Makedonoj kaj Helenoj kontraŭ Dario nur por ke ni ornamu nin per laŭro inda de niaj antaŭuloj, kiujn priantis la dieca Homero. Mi povas diri, ke al mia idealo mi restis nenion ŝulda nek apud Haironeia nek apud Granikos; sed hodiaŭ mi prijuĝas multe alie politikan signifon de miaj tiamaj agoj. Sobra vero estas, ke nia Makedonio, iel-tiel ligita kun Grekio, estis tiam de norde konstante minacata de tiuj barbaroj Trakoj; ili povus nin ataki en malkonvena momento, kiun poste Grekoj uzus por nuligi siajn kontraktojn kaj apartiĝi de Makedonio. Simple estis necese humiligi Trakion, por ke Makedonio havu ŝirmitan flankon en kazo de greka perfido. Ĉi estis nura politika neceso, kara Aristotelo; sed tion via lernanto tiam ankoraŭ ne komprenis sufiĉe kaj fordonadis sin al revoj pri Aĥilecaj agoj.

Per konkero de Trakio nia situacio ŝanĝiĝis; ni regis la

tutan okcidentan bordregionon de Egea maro ĝis Bosforo; sed nian regadon super Egea maro minacis la surmara potenco persa; precipe, ekstarinte super Helesponto kaj Bosforo, ni troviĝis en konsiderinda proksimeco de suverena sfero persa. Pli malpli frue devis inter ni kaj Persio okazi batalo pri Egea maro kaj libera navigado tra Pontiaj markoloj. Feliĉe mi ekatakis pli frue ol Dario povis sin prepari. Mi pensis, ke mi iras en postsignoj de Aĥilo kaj por la greka gloro estos konkeranta novan Ilionon; sed fakte, kiel mi nun vidas, temis pri nepra neceso forpuŝi Persion de Egea maro; kaj ni ĝin forpuŝis, kara instruisto, tiel funde, ke mi okupis tutan Bitinion, Frigion kaj Kapadocion, elrabis Cilicion kaj ne haltis ĝis en Tarso. Malgranda Azio estis nia. Ne nur malnova Egea maro, sed tuta norda bordo de Mediteraneo, aŭ, kiel ni diras, Egipta maro, estis en nia posedo.

Vi dirus, mia kara Aristotelo, ke nun estis plene atingita la ĉefa politika kaj strategia celo, nome la fina forigo de Persio el la helenaj akvoj. Sed post konkero de Malgranda Azio ekestis nova situacio: niaj novaj bordoj povis esti minacataj de sude, tio estas de Fenicio aŭ Egipto; el tie Persio povis ricevi helprupojn kaj materialon por plua militado kontraŭ ni. Estis do neeviteble okupi bordojn Tirajn kaj ekregi Egipton; per tio ni iĝis mastroj de la tuta marregiono, sed samtempe kun tio elkreskis nova danĝero: ke Dario povus, apogita je sia riĉa Mezopotamio, invadi Sirion kaj tiel apartigi nian egiptan posedadon for de nia Malgrandazia bazo. Mi do devis frakasi Darion, estu kiel ajn; mi sukcesis tion apud Gaŭgamela; kiel vi mem scias, falis en nian sinon Babilono kaj Susa, Persepolis kaj Pasargadai. Per tio ni ekregis la Persan golfon; sed por ke ni ĉi tiun novan posedadon protektu kontraŭ eblaj invadoj de norde, estis necese ekspedicii supren, kontraŭ Medojn kaj Hirkarnojn. Nun nia teritorio vastiĝis de Kaspia maro ĝis Persa golfo, sed restis sensirma kontraŭ oriento; do mi marŝis kun miaj Makedonoj en regionojn de Areia kaj Drangiano, mi dezertigis Gadrosion kaj senhomigis Arafosion, post kio mi venke okupis Baktrion; kaj por ke mi sigelu la militan venkon per konstanta ligo, mi edzinigis al mi Baktrian princidinon Rokšana. Ĝi estis simpla politika neceso; mi konkeris por miaj Makedonoj kaj Grekoj tiom da orientaj landoj, ke vole-nevole mi devis akiri niajn barbarajn orientajn regatojn ankaŭ per miaj reprezentado kaj pompo, sen kiuj la kompatindaj paŝtistoj ne scias imagi al si potencon regnestron. Estas vero, ke nia malnova makedona taĉmento tion malfacile toleris; al ĝi ŝajnis, ke ĝia komandanto fremdiĝas al siaj militaj kamaradoj. Bedaŭrinde mi devis tiam ekzekutigi mian maljunan Filoton kaj Kalistenon; ankaŭ mia Parmeniono perdis la vivon. Mi tion ege bedaŭris; sed tio estis neevitebla, por ke ribelo de miaj Makedonoj ne endanĝerigu mian pluan paŝon. Mi estis ja preparanta en tiu tempo militan ekspedicion en Hindion. Sciu: Gadrosio kaj Arafosio estas fermitaj en altmontaro kiel en bastionoj; sed por ke ili estu bastiono nekonkerebla, ili bezonas antaŭteritorion, el kiu oni povas aŭ ekatakigi aŭ cedi en bastionojn. Tiu strategia antaŭkampoj estas Hindio ĝis rivero Hinduso. Estis strategie necese okupi ĉi tiun teritorion kaj

kun ĝi transriveran terenon sur la alia bordo de Hinduso; neĉiu respondeca soldato aŭ politikisto agus alimaniere; sed kiam ni estis apud rivero Hyfasis, komencis niaj Makedonoj rezisti, ke ili plu ne iros pro laco, malsanoj kaj sopiro pri la patrujo. Mi devis reveni; ĝi estis terura vojo por miaj veteranoj, sed ankoraŭ pli terura por mi; mi intencis ĝisiri golfon Bengalano, por akiri en oriento naturan limon por mia Makedonio, kaj nun mi estis devigita provizore cedi en ĉi tiu tasko.

Mi revenis al Susa. Mi povis esti kontenta, konkerinte por miaj Makedonoj kaj Helenoj tian regnon. Sed por ke mi ne estu devigata fidi nur al miaj elĉerpitaj homoj, mi envicigis en mian armeon tridek mil Persojn; ili estas bonaj soldatoj kaj nepre mi ilin bezonas por defendo de la orientaj limoj. Kaj vidu: miaj malnovaj soldatoj estas pro tio ekstreme indignigitaj. Ili eĉ ne scias kompreni tion, ke akirinte por mia nacio orientan teritorion, centoble pli grandan ol nia patrujo, mi fariĝas granda reĝo de Oriento; ke mi devas nomi miajn oficistojn kaj konsilistojn el orientanoj kaj ĉirkaŭigi min per orienta kortego; ĉio ĉi estas evidentaj politikaj necesoj, kiujn mi plenumas en intereso de Granda Makedonio. Cirkonstancoj postulas de mi pluajn kaj pluajn personajn oferojn; mi portas ilin sen kontraŭdiroj, ĉar mi pensas pri grandeco kaj forto de mia amata patrujo. Mi devas toleri barbaran lukson de miaj potenco kaj brilo; mi edzinigis al mi tri princinojn el orientaj reĝoj; kaj nun, kara Aristotelo, mi iĝis ja eĉ dio.

Jes, mia kara instruisto, mi iĝis min proklami dio; miaj bonaj orientaj regatoj adoras min kaj alportas al mi oferdonaĵojn. Ĝi estas politika neceso, por ke mi havu konvenan aŭtoritaton super la montaraj paŝtistoj kaj kamelpelistoj. Kiel malproksimaj estas la tempoj, kiam vi instruis al mi uzadi racion kaj logikon! Sed la racio mem ordonas akomodi siajn rimedojn al la homa malsaĝo. Je la unua vido mia kariero povas al iu ŝajni fantazia; sed dum mi ĝin nun pririgardas en nokta trankvilo de mia dia laborejo, mi vidas, ke neniam mi ion entreprenis, kio ne estus nepre kondiĉita de mia antaŭa paŝo.

Rigardu, mia kara Aristotelo, estus en intereso de trankvilo kaj ordo, en racia intereso politika, ke ankaŭ en mia okcidenta patrujo mi estu agnoskita kiel dio. Liberigus miajn manojn ĉi tie en oriento, se mi havus certecon, ke miaj Makedonoj kaj Helado akceptis politikan principon de mia absoluta aŭtoritato; mi povus trankvile ekmarŝi por havigi al mia greka patrujo naturan limon nur sur bordo de Cinio. Per tio mi por eterne sekurigis potencon kaj sendanĝerecon de mia Makedonio. Kiel vi vidas, ĝi estas modera kaj prudenta plano; jam de longe mi ne estas tiu fantaziulo, kiu juris super la tombo de Aĥilo. Se mi nun postulas de vi, ke vi kiel mia saĝa amiko kaj gvidanto filozofie preparu kaj akceptebla por miaj Grekoj motivigu mian proklamon je dio, mi tion faras kiel respondeca politikisto kaj ŝtulo; al via konsidero estu lasite, ĉu vi tiun taskon volas plenumi kiel aferon prudentan, patriotan kaj politike necesan.

Salutas vin, mia kara Aristotelo, via

Aleksandro.

(Verkita 1937. El „Libro de apokrifoj“ trad. J. Vondroušek.)

## Kio estas budaismo

Multaj okcidentanoj havas ofte strangajn opiniojn pri la plej granda mondreligio, ili kredas, ke Budaismo estas iu ajn azia idoladoranta religio kaj Budao, la disvastiginto de tiu religio, iu idolo. Sed estas tute erare kredi tiel, ĉar la Budaismo estas la sola sendia religio, kiu ĝis nun ekzistis, la budaanoj konas nek ĉielon nek inferon en la maniero kiel la kristanoj aŭ islamanoj kredas, sed la Budaismo estas tutsola Vojo tra la Vivo kaj gvidilo al la liberiĝo de la universala sufero. Ekzistis multaj Budaoj antaŭ la Gotamo Budao, sed li, la iama reĝa princo el hinda gento, fariĝis la plej fama, ĉar li donacis al ni la doktrinon, al kiu ankoraŭ hodiaŭ apartenas proksimume 500.000.000 da homoj, plejparte en Azio; sed ankaŭ en aliaj partoj de la mondo troviĝas budaanaj grupoj kaj societoj, unu inter ili estas la Societo por Orienta Kulturo, fondita 1946 en Svedujo.

La Budao (Lumiĝinto) eltrovis post sepjara serĉado tri fundamentajn verojn, nome: la universalecon de sufero

kaj la malkonstantecon kaj variadon de ĉio, kio ekzistas kaj estas kreita; la nerealecon de la „Memo“ aŭ Egoo. Kaj li instruis al la homoj kvar Noblajn Verojn pri la sufero: 1. La sufero troviĝas ĉie kaj trapenetras la tutan vivon de ĉiuj estaĵoj. 2. La kaŭzo de la universala sufero estas avido kaj avaro, ĉar sen ia avido ne povus ekzisti la ĉiam denove rezultanta sufero, kiu devenas el nesatigitaj kaj el trosatigitaj deziroj! 3. La finiĝo de la sufero estas akirebla per la forigo de la personaj, egoismaj deziroj; tio postulas mensregadon kaj ĝustan vivmanieron. 4. La Vojo montrita per la Budao estas la Nobla Okera (Okobla) Vojo, kiu kondukas al Nirvano, t. e. la stato de plena trankvileco kaj la finiĝo de ĉiuj pasioj. La Nirvano estas atingebla sur la tero kaj dum ni vivas, sed estas nur malmultaj homoj, kiuj vere jam atingis ĝin en nia mondperiodo, kulture oni atingas ĝin post multaj renaskiĝoj kaj ĝis ni plene purigis niajn korojn!

La Okera Vojo estas jena: 1. Prava kompreno. 2. Prava

parolo. 3. Prava agado. 4. Prava klopodo. 5. Prava mens-regado. 6. Prava strebado. 7. Prava koncentriĝo. 8. Prava meditado.

La Vivo estas unu Tuto kaj eterna, fakte ne ekzistas morto, se ankaŭ ĉiuj vivformoj devas morti. Estas iomete malfacile por okcidentano kompreni la pensojn de orientanoj sed post fervora studado kaj prava vidpunkto oni certe sentas aŭ ekkonas la altajn verojn en la Budaismo. Multaj okcidentanoj sentas post studado ion, kio similas al kvazaŭ hejmenvenado, por multaj la filozofia religio

de la Budao estis la religio, kiun ili ĉiam senkonscie estis serĉantaj. La Budaismo toleras ĉiujn aliajn vivopiniojn kaj religiojn, pro tio neniam okazis dum 2500 jaroj de ĝia ekzisto iaj religiaj militoj kaj neniam estis iu ajn homo persekutata aŭ eĉ murdita de budaana organizaĵo pro sia kredo. Kaj neniam bestoj estis buĉitaj pro religiaj ceremonioj, alte taksas la budaano ĉiujn formojn de la vivo.

Plurajn informojn pri Budaismo donas gazeto „La Dharmo“ (La buda doktrino) ricevebla por unu intern. resp. k. U. A. R. Petri, SOK, Venavägen 49, Örebro, Svedujo.

## NOVAJ LIBROJ

Tiu ĉi nomaro de libroj estas mia ĉiujara kutima suplemento al listoj pri novaj verkoj, kiuj aperis lastjare. La cititaj libroj ne estas riceveblaj ĉe nia librovendejo.

### Nacilingvaj tradukoj:

El la bulgara: Elin Pelin: Elektitaj rakontoj (tradukis S. Hesapiĉiev), 97 paĝoj; Minkov S.: La alia Ameriko (trad. G. Hršev), 110 p.; el la dana: Bogh-Hogsted A.: Plol fantazio (trad. C. Graversen), 70 p.; el la franca: Daudet A.: Leteroj el mia Muelejo (trad. Mijake-Sihej), 79 p.; el la germana: Goethe J. W.: Faŭsto, volumo I. (trad. N. Bartlemes, II.-a eldono), 190 p.; el la hebrea: Mohseh Oved: Pro la merito de la tagoj (trad. A. Krolenbaum), 56 p.; el la holanda: Holst Henriette Roland: Roza Luksenburg, ŝiaj vivo kaj laboro (trad. Bas Wels), 236 p.; el la portugala: Agostinho da Silva: La portugala literaturo (trad. Manuel de Freitas), 28 p.

### Originalaj verkoj:

a) Beletristiko: Schwartz R.: La ĝoja podio (271 p.); Voĉoj de poetoj el la Spirita Mondo (Rio de Janeiro).  
b) Instruaj verkoj k. s.: Almanako de Universala Ligo, 1949 (238 p.); Butin M.: Komentario al Faŭsto (18 p.); Carolli P. M.: Preĝareto (3-a eldono, 69 p.); Dercks J. F. C. M.: Mistero kaj magio en Tibeto (23 folioj); Enketo pri internacia lingvo (eld. Sveda Esperanto-Federacio, 32 p.); Furhammer G.: Fontoj de l' vivo el la Sankta Biblio (64 p.); Gvidlibro pri Parizo (SAT, 62 p.); Jarlibro de UEA - 1949 (I-a parto 244 p., II-a parto 67 p.); Kalendaro por membroj de la Germana Esperanto-Asocio - 1949 (München, 69 p.); Kenjo Osaka: Esperantaj interjekcioj kaj onomatopoej (49 p.), la sama aŭtoro: Numeraloj kaj nombrovortoj (76 p.); Kongresa libro 1949 (Göttingen, 96 p.); Marshall Hattersley S.: Maŝinoj, mono kaj mond-

paco (60 p.); Nauokazu Kawasaki: Kunmetitaj vortoj el Zamenhofaj verkoj (176 p.); Rodo Ludovico: Vivo de Pisaro (28 p.); Salokamel H.: Dialogo inter kristano kaj ateisto (6 p.); Somera Universitato - Malmö 1948 (108 p.); Thalmaier L.: Al altaro de Dio! (43 p.); Tutmonda Katolika Adresaro Esperantista; Waringhien G.: Leteroj de Zamenhof (2-a parto, 374 p.).

### Lerniloj:

Butin M. C.: First Steps in Esperanto (7-a eldono, 280 p.); Koch H.: Esperanto-Schnell-Kurs (2-a eldono, 52 p.); Korte P.: Sub la verda standardo (2-a eldono, 40 p.); Setälä V.: Rekta vojo al lingvoscio (4 broŝuroj); Vanselow K.: Esperanto, lernolibro en versoj (124 p.); Quarello D.: Komplementoj de l' substantivo (64 p.).

### Kantaroj:

Evangelia Kantareto (eld. KEL, 32 p.); Kantaro (eld. Aŭstria Esperanto-Federacio, 24 p.); La verdaj paseroj kantas (Berlin, 48 p.); Liberala Himnaro (Londono, 36 p.); Ni kantu kaj deklamu (FEL en Amsterdam, 111 p.).

### Verkoj de ĉeĥaj esperantistoj:

Esperantista poŝkalendaro - 1949 (Esp. Klubo en Hradec Králové, 154 p.); Filip Jan a Karel: Písemný kurs mezinárodního jazyka esperanta v 10 částech (Praha-Břevnov) ciklostilita; Hromada R.: Slovník česko-esperantský (188 p.); Kamarýt S. dr. a Pumpr T. dr.: O zkouškách z esperanta (16 p.); Mařík J.: Lerneja reformo en Ĉeĥoslovakio (60 p.); Reček A.: Kurs esperanta (ciklostilita).

### Verkoj de slovakaj esperantistoj:

Dolinský J. V.: Velká slovenská učebnica medzinárodnej reči Esperanto (128 p.).  
31. XII. 1949.

J. Šupichová

## KRONIKO ENLANDA

Tridek jaroj estas pasintaj la 1-an de februaro 1950 de post fondo de nia Asocio. Rememorigis al ni tiun jubileon gratula letero de la Norvega Esperantista Ligo. Ni dankas sincere al la samideanoj norvegaj, ni estus forĝintaj pri la dato dum tumulto kuro de aferoj. Ni enskribu tie ĉi nomojn de laborintoj el la unua komitato, kiuj jam estas mortintaj: J. Eiselt, František Novák, Rudolf Fridrich, B. Tittl, A. Kudela, František Kavan, J. Popper, kaj ni malforgesu ilin pie! La vivantojn ni salutu, kaj precipe arde ni salutu la novajn kunlaborantojn, kiuj viglas en laboro nun. Estas jam nova generacio.

Esperanto-Servo, aktuala informo bulteno de Praha, reapervis en januaro post paŭzo kaŭzita per malsano de la redaktoro kaj pro teknikaj cirkonstancoj. La numero 4-a de la dua volumo estas tre leginda. Artikolo pri Ŝverma estos legata en fremdlando kun la sama intereso kiel tiuj pri brazila verkisto Jorge Amado kaj pri Jaroslav Hašek. Baldaŭ post tiu ĉi aperis plua numero, speciala eldono kvar-paĝa, dediĉita al Stalin. Multon legos eksterlandaj ricevintoj kun atento streĉa, ĉar ili scias nek tiujn revoluciajn vidmanierojn nek multajn faktojn. — Niaj membroj klopodu, ke neniu ekzemplero restu enlande sed estu sendita en fremdlandon.

Aperigo de la kvar oficialaj bildpoŝtkartoj de la Ĉeĥoslovaka poŝto kun esperantlingvaj tekstoj, pri kiu ni raportis sur p. 72 de la pasinta jarkolekto, signifas gravan faron. La kartoj estas el la serio aperinta la 1-an de no-

vembro kaj havas nombrojn 2, 5, 8, 24. Kostas po 3 Kčs, nia oficejo povas ilin liveri por tiu ĉi prezo plus afranko. Sed mendu ilin precipe ĉe via poŝtooficejo, kiu ilin prizorgos laŭ la peto. Uzu ilin ĉiuj, sed precipe samideanoj el Praha, Ostrava, Turč. Sv. Martin, Doksy. La bildoj estas efektive belaj.

Komisiitejo por Informoj kaj Klerigo en Bratislava eldonas sian oficialan bultenon pri kulturaj okazintaĵoj de post ĝia deka numero ankaŭ esperantlingve sub titolo **Kultura Revuo**. Tradukas ĝin s-o Imro Havas. La slovak komisiito akceptu nian sinceran dankon kaj gratulon pro tiu ĉi larĝvida decido. La legintoj de la revuo danku al la komisiitejo en Bratislava (Oktobrové nám. 12) multnombro.

„Ĉeĥa Betlehemo“ estis sinsekvo de ĉeĥaj malnovaj popolaj kantoj kristnaskaj kunigitaj per prozaj kaj versaj dialogoj kompilita de Dr Miloš Kabeš, tradukita de J. Filip kaj Dro T. Pumpr, adaptita de Ant. Slanina, kun muziko de Jan Kříčka, elsendata de la Verda Stacio merkredon la 7-an de decembro. Reĝisoris Dalibor Chalupa, orkestron kondukis Zdeněk Blažek. Kantis kaj deklamis granda aro da artistoj, kiujn ni ne citos laŭnome, ĉar la prezento efikis impone precipe kiel tutaj. De la komenca dueto ĝis la fina ĥoro la ritmo de la muziko kaj de la tekstoj tenis vin en la iluzio de naiva antikva kredo, ke iu superhoma forto tenas vin en la brakoj, kiuj vin precipe dum la kristnaska festo lulas. La elsendo estis ripe-tata la 4-an de januaro; ĝi donis eblon ankoraŭ pli pro-

lunde ĝui la aŭdadon de kantoj kaj etoson de situacioj.

Pri opinio de muzik-fakulo informas nin J. Mařík: „Mi dezirus de hodiaŭ, ke ĉiuj operoj estu turnataj (son-konservataj) en Esperanto. La Esperanta kanto estas kantebla eĉ pli bone ol la ĉeĥa. Ĝia ritmo estas perfekta.”

Tion deklaris — proksimume per tiaj vortoj — unu el la orkestro-ĉefoj de la Ĉeĥoslovaka radio Z. Blažek ĉe la sonkonservado de la programo de la Verda stacio „Ĉeĥa Betlehemo”, decembron 1949. — Ni aldonu, ke tiu juĝo validas ankaŭ pri d-ro T. Pumpr, kiu tradukis la ĉeĥajn popolajn kristnaskokantojn por tiu ĉi programo.

„Vendita Fianĉino“ elsendata de la Verda Stacio la 1-an de februaro signifas ĝian pluan elstaran faron. Estis elsendataj ĉefaj partoj de la glora opero kunigitaj de klarigaj versoj, verkitaĵoj por tiu celo de Tom. Pumpr, kiu estas ankaŭ aŭtoro de la traduko, ĉe kiu muzike kunlaboris Dr J. Fousek, Orkestron kondukis Jan Peška, reĝisoris Dalibor Chalupa, kantis Věra Strelcová Marinjon, Josef Válka Janon, R. Ašzhos Kecal-on, M. Pelcl Vaškon kaj Komedianton, Soňa Spurná Esmeraldan. La klarigajn versojn deklamis Höger, Procházková, Bobek. La tuto de la prezento estis rava travivaĵo. Orkestro kaj ĥoro ludis kaj kantis brile, la solkantantoj ĉiuj aŭdigis melodiajn agrable kaj surprize bone kompreneblajn. La aŭskultanto havis impreson, ke ĉiuj kantas kaj muzikas kun entuziasmo. Oni ne povas menciigi unuopajn kantistojn, ĉar la nivelo de la prezentado estis respektinde alta. Tiaj programoj ne estas nun jam aŭskultataj pro intereso esperantista, sed pro intereso prilua muzika arto mem. Eble la entuziasmo de la kantistoj estis kondiĉita ankaŭ de la bonegaj versoj de la traduko. Kaj la bona humoro de la aŭskultantoj certe estis helpata de la klarigaj versoj tre bone deklamataj. La kantistoj estas membroj de la Nacia teatro de Brno, la ĥoro kaj la orkestro tiuj de la Radio-stacio Brno. Ili ĉiuj akceptu dankon kaj gratulon. Kaj la reĝisoro Dalibor Chalupa, kiu kunlaboras kun la Verda Stacio deponi ĝia komenco, akceptu krom la danko kaj gratulo ankoraŭ bondeziron okaze de 50-a datreveno de sia naskiĝtago. Ni tion eksciis nur dum dissendado de gvidanto de la Verda Stacio.

La Esperanto-elsendoj el Praha okazas ĉiutage de la 15,45—16,00 horo per ondoj 31,41 m kaj 1935 m, kaj de la 22,00—22,15 horo per ondo 49,92 m. Nia mezonda programo okazas ĉiun lundon kaj merkredon de la 22,45—23,00 horo. La Verda Stacio elsendas sian artoprogramon la unuan merkredon en ĉiu monato je la 23 horo per ondoj 270 kaj 325 m. Tempo ĉiam mezeŭropa. Bonvolu sendi al nia radio-stacio konfirmon, ke vi aŭskultas nin, kaj notu, ĉu plaĉas al vi niaj programoj aŭ kio interesas vin en ĈSR. Skribu al: Ĉeĥoslovaka Radio, Esperanto-fako, Praha XII, Stalinova 12. Skribu ankaŭ ĉefoj (ĉeĥe)!

**Protesto kontraŭ teroro de Aŝida-registaro.** Prezidanto de nia grupo en Plzeň s-o Burda ricevis leteron de samideanoj-komunistoj el Japanujo, en kiu ili petis, ke ni protestu kontraŭ faŝisma teroro de japana registaro de Aŝida. Niaj Plzeňaj samideanoj kolektis 58 subskribojn oficialajn de diversaj organizaĵoj de la urbo (komunistaj, sindikataj, sportistaj ktp.) kaj kelkajn milojn da subskriboj individuaj sub esperantlingve redaktitan proteston, kiun ili sendis al japana registaro. Raportis pri tio Radio de Plzeň kaj ĉiuj regionaj gazetoj.

**Esperanto en telefonlibrojn!** Ni ĉiam rekomendadis, ke aktivaj kaj informitaj esperantistoj, kiuj posedas telefonan stacion, publikigu en telefona libro sian numeron ne sole sub sia nomo, sed ankaŭ sub „Esperanto”. Tiu dua represo okazas regule senpage aŭ por sumeto ne konsiderinda, sed ĝi signifas konstantan pruvon plej efikan dum daŭro de la telefonlibro, ke nia afero vivas en la urbo. Krome ĝi ebligas al esperantistoj rapidan trovon de samideano. La longjara UEA-Delegito Jaroslav Sustr en Praha sekvis nian konsilon kaj li povas rakonti pri plej interesaj spertoj. Ĉeĥoslovakaj esperantistoj kun propra telefonstacio zorgu, ke en la venonta libro aperu ilia numero nepre ankaŭ sub „Esperanto”. Ni estus tre kontentaj, se alilandaj esperantistoj imitus nian ekzemplon. (O. G.)

**Konferenco de la 4-a regiono** okazis en Mariánské Lázně la 12-an de novembro kun partopreno de 16 laborantoj el 7 lokoj de la regiono. Kun plezuro estis akceptita decido de samideanoj en Mar. Lázně aranĝi kurson kaj

fondi lokan grupon. En Nejdek komencis kurso gvidata de d-ro Vaněk. Plej granda intereso por nia afero regas en Loket, kie eminente laboras s-o Jež. R. Kolář (náměstí 5. května 16, K. Vary-Březová) estis komisiita prepari migrantan ekspozicion. Sendu ali li ĉiun materialon, kiun vi povas malhavi. Okaze de tiu kunveno donacis d-ro Vaněk al klubo de Cheb belan porcelanan statueton, cervon de K. Vary. La klubo transdonis al direktoro Otto Pavelka esperantan gramofondiskon pro lia pionira laboro en la regiono.

**Kunveno de la 11-a regiono en Olomouc** la 8-an de januaro en restoracio Těšetická kunvenigis 28 p. el Olomouc, Prostějov, Přerov, Přáslavice, Holice, Troubelice, Šumperk, Hlušovice, Litovel, Uničov, Hluk, Lanžhot, Třebčín, Hradec Králové. El Centra Komitato Asocia ĉeestis vicprezidanto Rud. Hromada. Estis donitaj raportoj de perantoj regiona kaj distriktaj, kiuj vidiĝas viglan vivon. En 12 distriktoj de la regiono estas jam en 9 distriktaj perantoj. Estas esperebla fondo de lokaj grupoj en Přerov kaj Šumperk. Regiona peranto Dr B. Žáček estis reelektita. — Sabaton antaŭ la kunveno estis amika vespero en la sama ejo kun programo deklama, kanta, muzika kaj aktora gvidata de s-o Vašek kun aktiva partopreno de dir. Havránková kaj kantistino St. Gažarová. Ĉeestis 60 p.

**Elturniĝemaj UEA-Delegitoj.** „Por Delegito oni elektu lertajn homojn, kiuj scias sin aranĝi, elturniĝemajn” kaj plue: „Ne decidu faka kono, sed la maniero laŭ kiu oni prilaboras informeton.”

Laŭ septembra numero de nia centra organo „Esperanto” tiel rigardas la aferon kaj tiel deklaris dum granda laborkunsido kongresa en Bournemouth reprezentanto de EAĈSR Ginz.

Nia Asocio ne povas partopreni tiun vidpunkton, ĉar ĝi neniel povas rekomendi, ke UEA-Delegitoj estu elturniĝemaj, t. e. ke ili sciu eviti siajn devojn. Fakan konon ĝi konsideras grava ĉe Delegitoj.

Tamen dume venis en niajn manojn Esperanto-Tidnigen de la sama monato, kie en kongresa raporto oni tuŝas la saman deklaron per vortoj tute aliaj: „Kiel Delegiton oni elektu ĝenerale intelektan personon. Li facile povos trovi la bezonatajn kontaktojn kun fakuloj, kiam tio estas dezirinda.” Tion ni povas plene subskribi.

Ni konas samideanon Ginz kaj ni konis lin antaŭ ol ni decidis sendi lin al Bournemouth. Li estis Delegito de UEA dum multaj jaroj, sed laŭ nia bona scio li ne kutimis serĉi pretekstojn por neplenumo de servoj t. e. li ne estis elturniĝema, sed li kontraŭe konsciencie klopiadis ilin plenumi laŭeble plej akurate. Kie lia kono ne sufiĉis, li sciis trovi fakulon kaj tiel demando de iu ajn speco estis ĉiam fakte respondita. Li aprezis tiujn sukcesojn kaj tiun labormanieron li deziris rekomendi al la Delegitaro.

Ni kredas samideanon Ginz, ke sole neatenta aŭskulto aŭ neĝusta kompreno kaŭzis mension pri „elturniĝemaj” Delegitoj, per kiu li mem sin sentis ankaŭ tuŝita kaj pli fidele reproduktis lian ideon la sveda raportinto.

**Lerneja Komisiono.** (Nepre legu ĉiuj Esperanto-instruistoj!) Finiĝis duonjaro de streĉa laboro. Kelkaj el vi sukcesis ricevi la permeson instrui Esperanton en interkonsultoj; sed skribis al mi nur malmultaj, al kiuj ni kore dankas.

Ĉar la Regionaj Naciaj Komitatoj (KNV) ne procedas egale al niaj proponoj rilate la instruadon de Esperanto, estas nepre necesa fidinda, t. e. komplete statistiko de tiuj lernejoj, ĉe kiuj Esperanto estas instruata. Tiu ĉi statistiko, estanta en niaj manoj, estos grava, efika kaj ofte eĉ decidiga argumento ĉe hezitantaj RNK-oj aŭ DNK-oj (ONV). Mi ekzemple ĉe supera ekonomia lernejo (!), estinta komerca akademio, ne ricevis la permeson, dume s-ano Friedrich kaj certe ankaŭ aliaj s-anoj ricevis ĝin por mezlernejoj. Se mi estus povinta citi al nia RNK dekon aŭ eĉ pli da lernejoj, ĉe kiuj Esperanto estas instruata, ankaŭ mi estus certe la permeson ricevinta. Sed tiu statistiko ne estas grava nur por nia internŝtata uzo, same grava argumento ĝi estas en la manoj de niaj eksterlandaj kolegoj ĉe iliaj malesperantemaj aŭ hezitantaj lernejoj-officejoj. Do mi petas vin, respondu ankoraŭ hodiaŭ la jenajn demandojn:

1. Kiu permesis la instruadon? (Ekz.: KNV aŭ ONV en.....).
2. Loko kaj lernejo ĉe kiu Esperanto estas instruata. (Ekz.: Pĕředin, okr. Třebiĉ, mezlernejo.)
3. Kiom da knaboj kaj knabinoj partoprenas la instruadon kaj ilia aĝo. (Ekz.: 9 knaboj, 13 knabinoj 14-jaraj.)
4. Kiu instruas?

Respondante, ne necesas ripeti la demandojn, sufiĉas citi la numeron de la demando kaj aldoni la du-trivortan respondon. Poŝtkarto sufiĉas! La respondon vi skribos en du minutoj! Oferinte al la instruado de Esperanto tutajn horojn, oferu al ĝi ankaŭ la du minutojn kaj skribu al

Lerneja Komisiono ĉe EAĈSR, Th. Kilian, Třebiĉ

**Ekzamena komisiono** kunsidis la 18-an de februaro en Brno por ekzameni 5 kandidatojn pri scio kaj 4 pri kapableco instrui. Ekzamenis Josef Kožený prezidanta, Rudolf Hromada, Teodor Kilian, Josef Vondroušek.

Diplomojn pri lingva scio de Esperanto ricevis František Frýbert, Ant. Herzán, Jar. Konečná, Libor Kovář, Bernard Papánek, ĉiuj el Brno. Estis donitaj notoj 1 eminente, 1 tre bone, 3 bone.

Diplomojn pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj ricevis (en krampoj estas temo de la hejma tasko):

Marie Adamcová, en hejma mastrumado, en Brno (Kial la naturaj lingvoj ne taŭgas kiel univers. lingvo internacia.)

Jaromír Hoffner, kateĥisto en Brno (Sociaj kondiĉoj por kreo de artefarita lingvo).

Aleš Berka, estro de Nacia Entrepreno en Vsetín (Problemo de eldonado de la libroj en Esperanto).

Milada Vondroušková, en hejma mastrumado, en Brno (Esperanto-movado inter la du militoj).

La rezulto estas 3 eminente kaj 1 tre bone kapabla.


Ni dankas al la ekzamenitoj pro la tre bona prepariĝo al la ekzameno kaj gratulas ilin pro la tre bona rezulto

**Kunveno de la junularo dum la kongreso en Liberec** okazis du. La unua dimanĉon posttagmeze, la 5-an de junio, de la SEL-anoj prezidata de la SEL-agento St. Lešinger. Li klarigis la situacion de Skolta Esper. Ligo kaj de la Nacia sekcio de SEL en ĈSR. Arde rekomendis al la junaj gvidi proprajn aferojn laŭ ekzemplo de la junaj en Brno. Membroj de SEL en ĈSR estas 240 junaj geskoltoj. Abonantoj de „La Skolta Mondo“ estas 270. — Dua kunveno estis tiu de la Junulara fako de la Asocio kune kun la anoj de SEL kaj de TJO lunde la 6-an de junio 1949. La kunvenon malfermis en la nomo de Liberec-anoj s-ano Jíra, prezidis St. Lešinger, anstataŭante la eksigintan gvidanton de la Junulara Fakoj. Li priskribis la ĝisnunan laboron de la Junulara Fakoj, alvokis ĉiujn al la kunlaboro, ripetis, ke ni devas niajn aferojn per propraj fortoj reorganizi, klarigis, ke la tuta organizo dependas ĉiam de unuopuloj, kiuj senĉese daŭrigas la mision inter la junularo. Li atentigis pri la alvoko de s. Paŭlo Palkanyi pri la Festivalo de la Junularo kaj tutmonda Kongreso de la Tutmonda Federacio de la demokratia junularo en Budapeŝto. Li instigis ĉiujn, kiu kontaktas kun la regiona centro aŭ kun la loka grupo de ĈSM, ke ili klopodu varbi novajn adeptojn por nia lingvo por tiu grava renkonto de la junaj homoj en Budapeŝto. Poste ni aŭdis pri la sukcesoj de junaj samideanoj. S-oj Mucha (Chomutov) kaj Gregoriades (Praha) raportis pri siaj klopodoj. Dum la diskuto oni plendis, ke la kongreson en Anglujo partoprenas nur maljunaj samideanoj (laŭ vortoj de s-ano Rohonczy, ke estas grave, ke la kongreson partoprenu nur t. n. „kanonoj“), sed estas grave, ke la kongreson partoprenu almenaŭ unu reprezentanto de la junaj. Dum la kongreso okazos la SEL-tendaro. La SEL-agento rekomendis la akcepton de aliĝo de SEL agentino L. Komžáková. Estas grave, ke la junaj renkontiĝu dum la Kongreso de Esperanto. Diskutu pri nia propono.

**Regiono Jihlava.** — En la kunveno pri la regionaj aferoj, okazinta la 4-an de decembro en Třebiĉ, estis interkonsentite, ke la regionon prizorgos nun s-o Josef Poláček, Třebiĉ, Stalinova 72, ĝis nova regiona peranto estos elektita.

**Josef Friedrich 60-jara.** Li naskiĝis la 13-an de januaro 1890 en Kroměříž kaj fariĝis esperantisto en sia 16-a jaro, li do apartenas inter la plej malnovajn samideanojn en nia lando. Li apartenas ankaŭ inter la plej junajn laŭ sia aktiveco kaj laŭ sia laborkapablo. Jam en 1911 ni trovas rezultojn de lia laboro: li estas inter fondantoj de

Esperantista Societo en Olomouc kaj tuj poste inter la fondantoj de Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Dum la unua mondmilito li vivis kelkan tempon kiel militkaptito en Berezovka en Siberio kune kun Baghy. Depost 1919 li laboris kiel fervoja oficisto en Košice ĝis 1938, kiam la urbo estis okupaciita de hungaroj kaj li post likvido de la fervoja direkcio de Košice transloĝiĝis en Brno. De germanoj li estis baldaŭ sendita en pension, ĉar li estis legiano, kaj povis rekomenci fervojistan servon nur post la liberiĝo en 1945 en Brno. Dum sia laborado en Košice li fondis lokan grupon de nia Asocio en 1922. La grupo daŭre vivis kaj ofte floris, modelo por grupoj pluraj. Jam tiu modesta kaj persista laborado loka garantiis por Friedrich gravan pozicion en la historio de nia movado. Sed li sciis ĉiam kunlabori kun nia centro kaj venadis de li iniciataj kaj instigaj ideoj daŭre. Depost ĝia fondo li estis aktiva komitatano de nia Asocio kaj laboris en diversaj fakoj. Li sciis ĉiam kun malofta kompreno de situacioj trovi por si fakon, kiu bezonis liajn talentojn kaj laborkapablon. El liaj laboroj organizaj estas precipe menciindaj gvidoj kaj organizoj de karavanaj vojaĝoj en fremdlandoj, organizo de laboro de Cseh-metodaj instruistoj, organizo de prelegvojaĝoj de fremdlandaj prelegantoj, kreado de lokaj grupoj, sistema varbado de membroj. En 1935 li akceptis funkcion de la kasisto, kiun li tenis ĝis sia elekto prezidanto, la 16-an de sept. 1939. Li faris multon en la sfero financa, kiel prezidanto en malfacila periodo de Protektorato li vidigis personan kuragon kiam gestapo fermis nian oficejon. Post liberiĝo kaj rekonstruo de nia movado Friedrich akceptis funkcion de regiona peranto en Brno, kiun li plenumas kun kutima ĉe li fervoro kaj inteligenteco. Ni salutu lin ĉiuj, amikon kaj modelon de multaj kaj por multaj. Lia bildo estis jam presita en Ligilo el 31. 12. 1939, kiu ne aperis pro fermo de nia oficejo fare de gestapo. Ni prezentas nun lian bildon samtempan, por ke ĉiu vidu, kiel junaj aspektas nun la sesdekjaruloj.



Sesdekjara  
Josef Friedrich  
kun sia filino  
Janinka

Karolo Piĉ:

## PUTRINTA POMPO

Folioj ŝvebas al la tero  
matene, tage, dum vespero.

Silente ili vojen drivas,  
kaj tie mortas kaj malvivas...

Kaj nur nun oni vidas klare  
kiom da ili malavare

printempe sur la branĉoj pendis.  
Sed tiam ĉi jam ilin sendis

teren aŭtuno, frostoj, ventoj,  
kaj rabaĵ manoj de momentoj...

Kaj sub fantomaj, nudaĵ arboj  
ili nun putras en eskarpoj...

# LINGVO

Pokračujeme v oblíbených úkolech překladových a dnes předkládáme čtenářům text, který byl dáván při zkouškách naší zkušební komise.

## Text 25.

Celá rodina Bojarův byla rodina snilků, krásných, neenergických lidí. Téměř všichni čekali, až se naskytne příležitost, nabídnout své služby a síly. Všichni bývali svěží, usmívaví a růžoví. Modré jejich oči měly kouzlo něčeho zasněného a jejich hlas byl poddajný, neurčitý.

Až nedávná, předchozí generace se vymanila z toho věčného otroctví. Usadila se na svém a hospodařila.

Prvorozený syn, Tóma, zdál se podnikavý a činně důvěřivý, přímý, smělý v řeči i v úsudcích. Černý jako havran na rozdíl od svých sourozenců zdědil jen málo a jen to nejzjevnější z romantiky svého rodu: lásku k starému, rodnému městu. Sestry přecházely tu se znepokojenými,

snivými úsměvy, i mladší bratr, rytíř snu, dobře tu byl schován v domku, jenž stál se zahrádkou na místě staré zdi městského opevnění. Tóma zdědil všechnen neklid a dobývačnost svého otce, malého statkáře, ostatní děti všecku nespokojenost romantiky matčiny. Tyto žily zde celé zimy s matkou, aby pak za léta přestěhovaly se k Tómovi, nejstaršímu synu, na venkovský statek v sousedním kraji. V městě byla příležitost vzdělání se literně i v hudbě. Město bylo jim veselé, kvetoucí, a odedávna rodina zakořenila se v něm tolika přátelskými svazky.

Několik roků již tak žili a ničeho se nezměnilo. Roky ubíhaly, nejstarší dcery vyvdaly se za ženichy. Děvče jedno po druhém odrůstalo. (Antonín Sova: Tóma Bojar.)

Překlady račte nám zaslat do 15. března. Vzájemná kontrola překladů nebo kolektivní překládání je znamenité thema pro klubovní schůze. Nejlepší překlad bude odměněn knížkou.

# NI LEGIS

**La 22-a kongreso de SAT en Parizo, 30. julio — 5. aŭgusto 1949,** estis tre grava pro nombro de aliĝintoj: 1620, el kiuj ĉeestis persone pli ol 1200, inter ili 30 el Germanujo, 27 el Aŭstrio. El Ĉeĥoslovakio la SAT-anoj el Plzeň preparis karavanon de 100 p., sed elirvizo ne estis donita pro valutaj kaŭzoj. Laŭ la tre bone farita protokolo en Sennaciulo (okt.) la ĉefa temo de la diskutoj estis danĝero de idea burĝiĝo de SAT. Unu el parolantoj eĉ riproĉis la eldonon de Leteroj de Zamenhof, ĉar „oni eldonis libron, kiu ne povas interesi SAT-anojn, libron, kiu interesas nur-esperantistojn. Almenaŭ tiu libro ne interesas min, nome konflikto, kiu okazis inter Zamenhof kaj kelkaj aliaj elektitoj.“ Malfacile oni trovus pli brilant ekzemplon de stulta individualisma pensmaniero, kia obsedas tiajn „socialistojn“ laŭ la citiloj. La gravan rezolucion pri Akademio ni jam publikigis. La argumentado por ĝi estas pripensinda, sed ni pensas, ke ĝi pravas sole en detaloj, ne ĝenerale.

**Internacia Instruista Kunlaboro** fondiĝis dum kongreso en Malmø kun ĉefa celo zorgi pri kolekto kaj listigo de ĉiuj oficialaj dekretoj koncerne instruadon de Esperanto en publikaj lernejoj kaj pri lerneja statistiko. En Bournemouth en kunveno, kiun ĉeestis ĉirkaŭ 150 ĝeinstruistoj, gvidata de W. Goodes, estis akceptita statuto de tiu organizo kaj nova nomo: Internacia Ligo de Ĝeinstruistoj Esperantistaj. Prez. estis elektita f-ino V. C. Nixon (Britujo) sekretario-kasisto E. Dahl (Box 900, Uddevalla, Svedujo).

**Grupa vivo.** La vikleco de landa movado respeguliĝas en rubriko sub tiu nomo en kvazaŭ ĉiu landa E-gazeto. Ni citas kiel plej interesajn: Esperantista (ĉeĥa), British Esperantist, Svenska Esperanto-Tidningen. Dansk E-Blad. Tion konstataŭ „Svisa Espero“ (sept.-okt.).

**UNO disvastigas tekston de Universala Deklaracio de Homrajtoj** akceptitan en Parizo la 10-an de decembro 1948, en esperanta traduko. La traduko aperis en Amerika Esperantisto (sept.—okt. 1949). Ricevinte koncernan numeron de Amerika Esperantisto la sekretario de Unuiĝintaj Nacioj (UNO) petis prezidanton de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko Dr W. Solzbacher, ke li havigu al ĝi mil ekzemplerojn de repesaĵo de la esperanta teksto de la Deklaracio por disvastigi la tradukon tra la tuta mondo. La EANA presigis la Deklaracion en bela 8-paĝa broŝuro kaj sendis ĝin al UNO. Ĝi estas la unuan fojon, ke UNO disvastigas presajojn en nia lingvo. (Laŭ Heroldo el 1. januaro.)

**Esperanto malpermesita en Portugalujo.** La portugala ministro por internaj aferoj malpermesis la propagadon kaj instruadon de Esperanto en la portugala teritorio. La ŝtatpolico PIDE (polico por internaciaj aferoj kaj por ŝtatdefendo) traserĉis la hejmojn de la direktoroj de la

Portugala Esperanto-Ligo kaj konfiskis, la 23. 8. 1949, ties arkivojn, bibliotekon kaj ceteran dokumentaron. La nomita Esperanto-organizo estas likvidita de la ŝtatpolico. Ĉiuj leteroj surhavantaj glumarkojn de Esperanto estos konfiskataj laŭ informo de la aludita polico. La portugala esperantistoj petas la specialan atenton de la eksterlanda esperantistaro pri tiu ĉi informo. Precipe orient-eŭropaj esperantistoj estas petataj ne skribi al la portugala esperantistoj, ĉar la ŝtatpolico estas speciale interesata pri la rilatoj inter portugaloj kaj orient-eŭropaj esperantistoj. (Esperanto, dec. 1949.)

**Prelegvojaĝon dum aŭtuno 1949** kaj sekvanta vintro kaj printempo 1950 entreprenas Dro Ivo Lapena el Jugoslavio, komisiita de UEA-estraro. Nun li prelegas pri diversaj temoj en Francujo, poste li iros Belgion, Nederlandon, Danlandon kaj versimile aliajn landojn. En Svedujo prelegas dum vintro 1949/50 egipto Trados Megali, ankaŭ kun granda sukceso.

**Plimultiĝo de vortoj kreataj el propraj elementoj** de la lingvo anstataŭ enkondukado de neologismoj estas laŭ J. Regulo Perez unu el simptomoj, kiuj garantias, ke nia lingvo ne disdialektiĝos. Nun oni uzas kun ĝenerala aprobo vortojn kiaj: geo, boeco, areto, ineto, etpreza, eĝpreza, ilaro, inda, ularo, egulo, etulo, insekso, ecaro, erigi, anigi, idaro, ulineto ktp. Paralele, preskaŭ ĉiuj jam kun literatura tradicio, vicigiĝas ĉiuj = demandi, fora = malproksima, ena = interna. Ankaŭ: o-vorto = substantivo, a-vorto kaj simile pluraj. (Boletion, Ruzafa 7, Valencia, nov. 1949.)

**Velŝipeto „Nova Espero“** longa 6 metrojn, larĝa 1,5 m kun masto portanta la ĉefvelon, kiu leviĝas nur sep metrojn super la marnivelo, estis kondukita de du junaj entuziasmaj esperantistoj fratoj Colin kaj Stanley Smith trans Atlantika Oceano. La vojaĝo de Halifax en Nova Scotia (Kanado) ĝis Dartmouth en Devon (Anglujo) daŭris en somero 1949 43 tagojn. La velo de la eta jaŭto portis nian stelon. La sportista faro de fratoj Smith estis sensacio, la britaj ĵurnaloj raportis pri ĝi sur unuaj paĝoj sub titoloj „Kiu diris, ke la Brita spirito suferas pro dekadenco?“ „Kiu diris, ke aventuremo de juna Brito formortis?“ La ŝipeto estis elmontrata en diversaj amuzejoj en Londono, Blackpool kaj en aliaj lokoj kaj fratoj Smith faris prelegojn ankaŭ ekster Britlando. Cie la ekspoziciado de la jaŭteto estis uzita por Esperanto-propagando, estis vendita lernolibroj kaj disdonitaj propagandiloj. La tuta movado ŝuldas efektivan dankon al la eminentaj samideanoj sportuloj. (Laŭ Ferd Parker en British Esp., nov.-dec. 1949.)

**Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA)** havas jam 137 membrojn (laŭ ĝia informilo n-ro 8). Ĉar temas pri profesiaj ĵurnalistoj, la nombro estas surprize granda. „La sama suno lumigas la mondon“ estas japanlingva

verko kun esperantlingvaj titoloj de T. Kurisu. Li kolektis en ĝi esperantlingvajn leterojn de siaj korespondantoj antaŭ- kaj postmilitaj tradukitajn en la japanan. La 58 leteroj estas el Nederlando, Svedlando, Danlando, Usono, Britlando, Borneo, Ĉinujo, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Bulgarujo, USSR, Francujo. La 326-paĝa libro aperis ĉe eldonejo Kitaozi, Kioto, 1949 kaj la aŭtoro dediĉis ĝin al sia franca amiko Honoré Bourguignon, pereinta en la Dachau-koncentrejo.

**Eminenta esperantisto tradukas Goethe en hebrean lingvon.** Literatura revuo hebrea Mosnajim, aperanta en Tel-Aviv, alportas artikolon de Lañover pri tradukoj el Goethe en hebrean lingvon. Inter la Goethe-tradukantoj estas citata ankaŭ Emanuel Olsvanger. Liaj „Lirikaĵoj de Goethe“ aperis en 1943. Enestas ankaŭ fragmentoj el Faŭsto. Olsvanger estas aktiva esperantisto, kies oratoran arton admiris partoprenantoj el la antaŭmilitaj kongresoj. (O. G.)

„Juna teatro de Espero“ estis fondita en aŭtuno 1949 en Berlin de grupo de junaj aktoroj, por akceli Esperanton per ilia arto. (La estonto esperantista, Hannover, dec. 1949.)

**La magistrato de Berlin** enkondukis ekde la lernejjaro 1949/50 Esperanton kiel egalrajtan lingvon apud la angla kaj la franca lingvoj en la okcidentberlinaj lernejoj. Esperanto estas instruata kiel dua libervola fremdlingvo en la 7-a kaj 8-a klasoj. Pro manko de instruistoj oni ĉi-jare gvidis nur malmultajn kursojn en la lernejoj. Tial decidis la magistrato samtempe enkonduki oficialan kurson por instruistoj. Tiu instruisto-kurso estas senkosta. Rajtas partopreni nur personoj, kiuj jam laboras kiel instruistoj en la okcidento de Berlino. La salajro por la docento enestas en la urba budĝeto. (La estonto esperantista, decembro 1949.)

„Usona revuo“ estas nova gazeto, kies unua numero bele presita kaj interese redaktita de S. A. Klukowski aperis en septembro 1949 en Milwaukee, Wis. La gazeto estas dediĉita „al internacia kunlaboro per Esperanto“. Ni legas en tiu numero sciigon, ke la eldonantoj sukcesis „enkonduki Esperanton en Kolegion Beloit kaj en aliajn mez- kaj altlernejojn de la ŝtato Viskonsino“. Eldonanto de la revuo estas nove fondita The Esperanto Interlanguage Foundation Inc., 1018 W. Lincoln Ave., Milwaukee 7. Wis.

**Malgrandan liston de Rotarianoj** uzantaj Esperanton ni trovis en „Usona Revuo“ (sept.): John A. Peart M. A. en Winchester, Jožka Škorpiel en Tábor, Vilho Setälä en Helsinki, Prof. Gaetano Facchi en Brescia, Hilario Zayas en Cuba. Ni aparte ĝojas, ke ni legas inter tiuj nomoj aktivan samideanon el Tábor.

**La nova propaganda gazeto en Argentino.** Boletín ECO aperanta en Buenos Aires (Gazcón 1454) enhavas paĝon de spritaĵoj titolitan „Salo kaj pipro“, kies tekstoj estas en la hispana kaj en Esperanto.

**Verda Steleto**, nomata informilo de Centra-Esperanto-Oficejo en Torino (Via Modena 33) aperas jam la kvaran jaron en la itala kaj en Esperanto.

**Nia kanto** de S. K. Neuman, tradukita de Miloš Lukáš, aperas en Internacia Kulturo n-ro 3-4/1949.

**Pri renkonto kun Eduard Kühnl**, ĉeĥoslovaka Esperanto-laboranto el tempo antaŭ la unua mondmilito skribas F. Villar en la Bulteno de Argentina Esperantisto, Buenos Aires (n-ro 256, febr. 1949) en eksterordinare interesa artikolo „Esperanto trans la Andoj“: ... Unu nokton, irinte al la grava Liceo Hanssen kun prof. René Garcia, mi ekkonis la rektoron Ambrosio Rabanales, ankaŭ kvalifikita profesoro de la Nacia Universitato, kiu same parolis klaran, fluantan Esperanton. Esperanto estis perfekte parolata ankaŭ de veterano, la ekssekretario de la Ĉeĥoslovaka Legacio en Santiago, s-ro Eduardo Kühnl, estinta sekretario de la Unua Kongreso en Bulonjo-ĉe Maro, kiu, farinte diversajn vojaĝojn ĉirkaŭ la mondo, nur parolinte nian mondlingvon, ekamis la belan landon de araŭkanoj kaj tie mem, ĉe la neĝkovritaj montoj de Santiago, li decidis restadi, eble por ĉiam, kaj kunlabori laŭ siaj ebloj kun la ĉila movado. Tutan vesperon ni estis babilantaj en lia bieneto, kie li menciis al ni interesaĵojn, rikoltitajn dum lia observema migrado tra la mondo: la Majstro, de

Beaufront, Privat, Lorenz (dum li estis en Prago), Sepulveda Cuadra en Ĉilio. Kaj en Hispanio generalo Mangada kaj multaj aliaj eminentaj nomoj estis ligitaj al tre spritaj anekdotoj. (O. G.)

**Arda amiko** estas artikoleto, aperinta en n-ro 8/1949 de La Rondo, ofic. organo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, parolanta pri interesaj spertoj en Ĉeĥoslovakio de E. S. Hanks de la Melburna E-klubo, vojaĝinta tra nia lando en 1938. Tiu numero alportas plujajn simpatiajn menciojn pri nia lando. (O. G.)

**Ankaŭ en la Lingva angulo** de Internacia Kulturo (n-ro 9/1949) ni legas legindajn kontribuadojn de ĉeĥaj samideanoj O. Vyhnal pri „ol“ kaj J. Kořínek refuton al Ku-backi. Bravo amikoj!

**Esperanto en Japanujo.** Nove fondita Fremdlingva Kolegio de la urbo Kobe enkondukis Esperanton en la Kultursciencan Fakon kiel devigan kurson. La katedron okupas prof. Y. Nukina. Osaka Fremdlingva Kolegio (ŝtata) havas esperantan katedron kiel kurson en specialaj studoj sub gvido de prof. Kawasaki-N. La kolegio vicigita nun inter universitatojn havis Esperanto-katedron ankaŭ ĝisnun, kiam ĝi estis duagrada kolegio. Otani universitato (budaana), kie estis jam Esperanto-kurso, enkondukis ĝin en sian novan fakultatan Kultursciencan kiel liberan kurson gvidatan de prof. F. Dazai. — Almenaŭ en 15 universitatoj troviĝas esperantistaj grupoj, el kiuj la plej viglaj estas en Maebasi Medicina Kolegio, Tiba Medicina Kolegio, Osaka Universitato, Okayama Medicina Kolegio, Agrikultura Fakultato de Niho-Universitato. — Sekve de reformo de la lernejsistemo fondiĝis multaj dugradaj lernejoj. Ĝisnun en pli ol 20 superaj dugradaj lernejoj fondiĝis esperantaj grupoj kun pli ol 400 membroj. La plej granda inter ili estas Esperanto-Societo de Yatusiro Supera Duagrada Lernejo en Kumamoto-ken, kiu havas 60 membrojn. En Doobun Lernejo en Kobe (por ĉinoj) oni instruas Esperanton al ĉiuj lernantoj sub gvido de s-ro N. Osada, asistprofesoro de Kobe Fremdlingva Kolegio. — Multaj lokaj ĵurnaloj ofte raportas pri Esperanto, plej ofte pri esperanta korespondado. (Laŭ La Revuo Orienta, julio 1949.)

**En Argentino** la movado daŭre vivas kaj kreskas. Rosario Esperanto-Klubo festis sian trijaran ekziston la 15. 9. 1949 per aperigo de monata ciklostilita revueto „Nia Flameto“ (Suipacha 727, Rosario), tre plaĉe aranĝita. Ni ĝoju kun ili!

**Germana Federacia Fervojo** subtenas oficiale Esperanton. Laŭ dekreto el 9. aŭg. 1949 n-ro 15.152 Uabsg (Esp.) de ĝen. direktoro Busch la unuiĝo de la fervojaj faklernejoj transprenos la taskon disvastigi Esperanton inter la fervojistaro per aranĝo de Esperanto-kursoj. (La Ponto, nov.-dec. 1949.)

**Germana poŝto rekomendas Esperanton.** La direktoro de la Germana poŝto en letero el 15. sept. 1949 deklaras sin preta rekomendi al poŝtistoj laŭvolan lernon de Esperanto. (La Ponto nov.-dec. 1949.)

**Studvojaĝo de eksterlandaj studentoj** (9 francoj kaj unu norvego) vizitis Danlandon, la 2—16-an de sept. 1949, invititaj de la Studenta Esperanto-Klubo en Kopenhagen, kaj vizitis lernejojn de ĉiuj gradoj de la elementaj ĝis universitato kaj diversajn fabrikojn.

**Sveda Laborista Esperanto-Asocio** ĉiam klopodis konservi bonajn rilatojn kun la sveda sindikata movado, kaj ni povas diri, ke ni parte sukcesis, ĉar proksimume cent sindikatoj ĉiujare donas monsubtenon al SLEA. (Arbetar-Esperantisten, sept.-okt. 1949.)

**Ni evitu esti nur esperantistoj** diras W. Enterich en Arbetar Esperantisten (sept.-okt.) finante sian artikolon per sekvantaj vortoj: „Nur kiam estiĝas supernaciaj organoj ni povas venki ideon de l' nacismo en ĉiuj ĝiaj formoj kaj nur tiam Esperanto havos ŝancon gajni teronon. Ni ne forgesu, Esperanto ne estas ĉefe lingva problemo, ĝi estas antaŭ ĉio politika demando.“

**Honora prezidanto de la Aŭstria Esperanto-Federacio** estas Sekcia ĉefo Dr. Karl Dworschak, ĝenerala poŝt-direktoro, prezidanto eksministro Dr. Hans Frenzel, afergvidanto kalkul-sekretario Rajmund Cech. (Laŭ rezulto de elektoj en la kongreso en Graz la 19. 7. 1949.)

**Germana Esperanto kongreso en Göttingen** kunvenigis 1100 kongresanojn, inter ili multajn el eksterlando.

**„Ĉeĥoslovakio konstruas fundamenton de la socialismo“** titolas artikolo de Hubert Slavik en Internacia Kulturo (sept. 1949), kiu raportas precipe pri niaj rezultoj en industria produktado. La artikolo estas akompanata per bildoj de pluraj ĉefaj „laborsturmuloj“ (úderníci). En la sama numero raportas Jarmila Faltynková pri Esperanto en ĉs. lernejoj kaj Imrich Zálupský pri laboro sia kaj de rondeto de liaj kunlaborantoj pri tradukado el la japana kaj la ĉina por publikigo en slovakaj gazetoj. Ĉio tio estas tre edifanta pruvo pri aktiveco de ĉeĥoslovakaj esperantistoj.

**Centan datrevenon de morto de Sandor Petőfi** en 1949 rememorigis Internacia Kulturo (sept. 1949) per artikolo de K. Kalocsay kaj per liaj tradukoj de du poemoj „Palaco kaj kabano“ kaj „La Juĝo“. Ni relegu la finon de la artikolo: „Historia kontentigo kaj granda fiero estas por ni hungaroj, ke nun, ĉe la centa datreveno de la martira morto de Petőfi, ree, kiel tiam, tamen ni luktas kaj laboras por konservi la akiritan liberon, starante en tendaro de la libero kaj progreso, inter la popoloj gvidataj de la lando de socialismo, la granda Sovetunio.“

**Nian kongresan rezolucion** reprenis Internacia Kulturo en sia 8-a numero kaj ĝia redaktoro Assen Grigorov alu-

## LOKAJ INFORMOJ

**Boskovice.** — Kurso komencula en Popola Akademio depost 30. 11. gvidata de JUST Lumir Vodička, por 25 p. — Distrikta peranto Jindřich Herdin en Letovice.

**Brno.** — Instruadon en interes-rondeto ĉe knaba mezlernejo en Žabovřesky komencis J. Friedrich la 30. 11. La rondeto estas oficiale aprobata kaj partoprenas en ĝi 18 lernantoj. Popola Akademio en Tuřany malfermis kurson la 7-an de dec., instruas Jaromír Hoffner 20 p. — Programo de la klubaj kunvenoj: 3. 1. Liriko de Julio Baghy (J. Friedrich), 10. 1. Ĉeĥa violonarto (Josef Vondroušek), 17. 1. Dek du mensoguloj (Kolektivo sub gvido de V. Borská), 24. 1. Jiří Wolker, poeto sen ĥimeroj kaj utopioj (Jiří Kořínek), 31. 1. Esperanto-movado inter la du mondmilitoj (Milada Vondroušková), 7. 2. Ĝenerala kunveno, 14. 2. Teatra vespero (reĝisoras V. Borská), 21. 2. Verda Karnavalo, 28. 2. Gaja menso konkeras la mondon (Josef Jilek), 7. 3. Soleno al la 100-a naskiĝtago de TGM, 14. 3. Vespero de kantoj kaj arioj (kantas Věra Borská, operkantistino, ĉe piano prof. Šháněl, piano-virtuozo), 21. 3. Literatura vespero (Jaromír Hoffner), 28. 3. La vivo de Mme M. Curie (Hilda Kořínková), 4. 4. Poezia vespero (Recitado-konkurso), 11. 4. Iom pri la kantado kaj kantistoj (Eliška Kalousová), 18. 4. Donacantoj de la vivo (Josefa Borkovcová), 25. 4. La lando de Aztekoj (Frant. Frýbert). — La kunveno okazas ĉiumarde je la 20-a horo en hotelo Passage, Lidická 23.

**Brno-Židenice.** — Kurson por 15 komencantoj gvidas ekde oktobro s-ino Milada Jakubcová.

**Bruntál.** — Dum konferenco la 14-an de novembro en hotelo Hvězda estis elektita distrikta peranto Josef Pařízek, direktoro de meza lernejo en Rázová.

**Hradec Králové.** — La Klubo ricevis de la urbo pluan subvencio de 2000 Kčs en fino de la jaro 1949. — Kurso por progresintoj komenciĝis en la klubejo la 24-an de januaro. — Tradicia Jozefa festo okazos la 18-an de marto.

**Cheb.** — Funkcias tri kursoj: por lerneja junularo, por komencantoj kaj por progresintoj. E-klubo kunvenas regule ĉiun vendredon. Bone sukcesinta Nikolaa vespero kun 40 partoprenintoj.

**Chomutov.** — En Industria Lernejo estis fondita interres-rondeto, kiu korespondas esperantlingve kaj individue kaj kolektive. Kurson por 15 progresintoj gvidas s-oj Mucha kaj Pastor. Per la lerneja disaŭdigo estis elsendataj esperantlingvaj sciigoj por studentoj-esperantistoj.

**Jeseník.** — Dum kunveno la 18-an de decembro estis elektita distrikta peranto Ludmila Holoubková (Na úbočí

das ĝin en sia ĉefartikolo „Kontraŭ la kosmopolitismo“: „Ankaŭ la esperantistaro decide kontraŭbatalas la perfidan burĝan kosmopolitismen. Kontraŭ tiu ĉi veneno starigas la firman demokratian kaj proletan internaciismen.“

**Leteron en ĈSR** de Zdeněk Rezáč enpresis Esperantista Laboristo el januaro-februaro 1950.

**R. Rosetti** raportas pri sia vojaĝo tra Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Aŭstrio dum pasinta somero en The British Esperantist (jan.-feb.). Ni tre ĝojas pro lia aserto, ke li estis tre kontenta dum restado en nia lando kaj ni uzas la okazon por saluti lin kaj lian edzinon amike.

**TJO, Belĝa Bulteno**, Informilo de Belĝa Sekcio de Tutmonda Junular-Organizo (R. Borremans, r. de Bériot 2 a, Bruselo) aperas ĉiudumonate, ciklostilite, po du paĝoj.

**Roman-forma biografio de Zamenhof** verkita de A. López Luna, konata verkisto hispanlingva, aŭtoro de aliaj tri roman-biografioj, aperis en 1948 en Buenos Aires kun titolo „Zamenhof — iniciador del Esperanto“, 176 paĝoj 15×21 cm. Ni citas el Brazila Esperantisto (jan-marto 1949): La aŭtoro prezentas en romana formo la vivon kaj la verkon de L. L. Zamenhof al la hispanlingva mondo per klara eleganta stilo, kiun portugallingvano tuj komprenas... Ni en libera Ameriko nenion komprenas pri naciaj kaj rasaj malamoj de la antikva mondo, apenaŭ povas kredi je la terurigoj, kiujn suferis la bonkora familio de Zamenhof, pro la krimo, ke ĝiaj membroj estis judo-devenaj kaj civitanoj de konkerita lando.“

452). Depost 13-a de januaro regulaj kunvenoj ĉiun vendredon en hotelo Slezský dvůr je la 19-a horo.

**Jihlava.** — Same kiel en 1948, estis ankaŭ en oktobro 1949 aranĝita komune kun la sindikata Instituto de modernaj lingvoj E-kurso, gvidata ĝis 1-a de decembro de redaktoro Jenda Zeman, kiu transiris nun al distrikto Gottwaldov. En la kurso kun 16 p. instruas nun Stáňa Coufal, kiu sukcese gvidas ankaŭ la lokan E-klubon anstataŭ la foririnta J. Zeman. (re)

**Karlovy Vary.** — 18-an de decembro aranĝis E-Klubo Zamenhofian vesperon. Partoprenintoj estis regalitaj per teo kaj farunajoj. Samideano Dr Vaněk kun sia kvarteto prizorgis neforgeseblan koncerton. Junaj gesamideanoj bone kolektive recitis pri vivo de nia Majstro. La 7-an de januaro aranĝis Esperanto-Klubo sian balon, kies ora najlo estis scenoj el Shakespeare, prezentitaj de s-o K. Höger kaj s-ino Z. Procházková el Praha kaj kantarto de oferema s-ino Věra Borská el Brno. — 26-an de januaro okazis nia ĝenerala kunveno. Prezidanto estas nelacigebla Dr F. Vaněk, sekretario Ant. Reček (Stalinovo 5). — Kurson por komencantoj gvidas A. Reček, por progresantoj P. Tichota. — Oni preparas denove Someran Supran E-kurson, pri kiu ni baldaŭ pli detale informos. (Ta)

**Kladno.** — Senpaga E-kurso komenciĝis la 29-an de novembro en la I-a mezlernejo, Kleiner-strato.

**Jablonec n. N.** — Komenciĝis kurso en la kadro de la „pli alta popola lernejo“, 40 partoprenantojn instruas membro de la klubo. — Ĉiun korespondanton al la klubo sendu al la sekretario Rony Janečka, Skřivánčí 66.

**Kolín.** — La 8-an de novembro komenciĝis en domo de la gimnazio du E-kursoj. Instruis dufoje semajne K. Šolc 17 gestudentojn kaj 20 plenkreskulojn. La 14. XII. Zamenhof-vespero kiel kursina festo. Parolis s-o Halška, pluan programon prizorgis s-oj Šolc, Růžicka kaj aliaj.

**Kopřivnice.** — Kunvenoj regule ĉiusemajne en meza lernejo, komenciĝis nova kurso. (Práce 6. X.)

**Lanžhot.** — Kurson por 28 komencantoj gvidas laŭ Kilian-lernolibro Fr. Svačina. Gekursanoj pagos sumon egalan al la Asocia membrokotizo, kiu estos sendata al la Asocia kaso. Post kursfino ricevos la gekursanoj adresojn por povi korespondi kun la tuta mondo pri temo „Kiel ĉesigi fumadon?“. Gesamideanoj, kiuj volas viziti s-on Svačina, povas tion fari sole dum dimanĉoj, ĉar dum la-bortagoj li laboras en Loka Nacia Komitato. Tranoktadon kaj manĝadon dum la vizito prizorgos samideano Svačina en sia propra domo.



**Letovice.** — Popola Akademio malfermis en novembro E-kurson por komencantoj. Anna Čapková instruas 20 p. - Prelegon de J. Frjedorich la 10. XI. aŭdis 50 personoj.

**Litovel.** — Konferenco okazis la 11-an de decembro en hotelo U bílého konička. Estis elektita distrikta peranto Marie Máčková, Fierlingerova 327.

**Litvínov.** — Kurson por 15 komencantoj gvidas depost oktobro s-o Pastor. En novembro komenciĝis kurso por ministaj lernantoj, kiun vizitas 19 knaboj, instruas s-o Řiha. Klubaj kunvenoj ĉiumerkrede, dum ili perfektiga kurso, gvidata de s-o Košťál, kiu vojaĝas ofereme por tiu celo el Teplice. La klubo korespondas kolektive kun kluboj en fremdlando.

**Lutín apud Olomouc.** — En fabriko Sigma esperantista grupo, gvidata de Vágner. Kunvenas regule ĉiun mardon je 14,45 horo. Instruas Jedlička kaj Kubová.

**Moravský Krumlov.** — Distrikta peranto prof. Rudolf Dokoupil en Ivančice.

**Most.** — En oktobro komenciĝis kurso por progresintoj kun 25 p. gvidata de s-o Mucha. La 3-an de novembro komenciĝis kurso en Popola Akademio. En la kinejo estis dum projekciado de nia propaganda diapozitivo dirita mallonga prelego per la endoma disaŭdigo. La 21-an de decembro okazis interkonatiĝa vespero por Ústí-regiono.

**Olomouc.** — Regulaj kunvenoj de E-Societo depost 5-a de januaro denove ĉiun ĵaŭdon en Masarykovo nám. 25. Komitataj kunvenoj unuan ĵaŭdon de ĉiu monato post membra kunveno. Junularo, gvidata de Vsolek, kunvenas ĵaŭde je la 18-a horo. Membronombro de la Societo en decembro 1949: 221.

**Ostrava.** — Ĉe E. K. Ostrava I konstituiĝis la 1. I. 50 Junulara Sekcio, kiu kunvenas regule ĉiulunde je la 19-a horo en sukeraĵejo Šikuta (O. Zábřeh, Bělský les). En la jarkunveno la 9. I. estis elektita 13-membra komitato kun prez. Drahomír Kočvara, sekretario Bř. Konečný, prop. ref. Lad. Kyselý, kasisto M. Neuvirth. La sekcio havas 47 membrojn.

**Pěňčín apud Jablonec n. N.** — Kurso en la mezlernejo en kadro de Instituto de Modernaj Lingvoj (ROH), 30 p. instruas Miloslav Jira el Jablonec.

**Plzeň.** — De la 12. X. 49 ĉiumerkrede je la 19—21 h. en Domo de kulturo gvidas trimonatan kurson por komencantoj s. Ríenerová kaj Šloufová laŭ lernolibro de Kilian, ĉeestas 30 komencantoj. - De la 4. X. 49 ĉiumarde kaj vendrede je la 19—21 horo en LUH (Popola Universitato) gvidas trimonatan kurson por komencantoj s. Svoboda laŭ lernolibro de Kilian, ĉeestas 30 komencantoj. - De la 11. X. 49 ĉiumarde de la 20 horo en Nýřany gvidas 20-horan kurson por komencantoj s. Valenta laŭ lernolibro Petro, ĉeestas 20 komencantoj. - La 27-an XI. 49 okazis en Slovan. Beseda Regiona kultura konferenco, kiun ĉeestis delegitoj de nia grupo kaj de la grupo Rokycany. Bedaŭrinde niaj reprezentantoj pro manko de tempo ne parolis, ĉar ili estis enskribitaj en la listo de parolantoj preskaŭ kiel la lastaj. - La grupo ricevis de la Kleriga konsilantaro 1000 Kčs kiel subtenon kaj premion pro la sukcesa preparo de ekspozicio „Klasbatalo de la tuta mondo“.

**Praha.** — Programo de kunvenoj de la E. K. (ĉiumerkrede je la 20 h. Praha I, Příklad 17, I. etaĝo, Kulturní klub zam. ÚNV): Ciklo de 10 prelegoj el historio de Esperanto, el esperantologio, kaj esperantismo fare de Dr Aug. Pitlík, lektoro de Esperanto, ĉiun duan merkredon je la 20,30 horo. 1. Enkonduko en studon de Esperanto, ĝiaj gramatiko, literaturo kaj movado, listo de fontoj (25. I.). 2. Historio de ideo de la lingvo internacia (8. II.). 3. Zamenhof kaj lia verko (22. II.). 4. Evoluo de E. de 1887 ĝis hodiaŭ (8. III.). 5. Historio de la E-movado, periodo krea, slava-germana, franca (22. III.). 6. Periodo internacia (5. IV.). E-movado en ĉeĥoslovakaj landoj (19. IV.). 8. E-literaturo tradukita kaj originala (3. V.). 9. Daŭrigo (17. V.). 10. E-konstitucio, Interna ideo, Akademio de E., UEA (31. V.). En ceteraj vesperoj: 1. II. Medicinaj vegetaloj (M. Pulchert). 15. II. Pri ŝtato Izraelo, kun filmo (O. Ginz). 1. III. Jarkunveno. 15. III. Pri Karel

Čapek (PhC L. Stejskal). 29. III. Medicinaj vegetaloj (M. Pulchert). 12. IV. Projekciado de gajaj filmoj (Ant. Slaniňna). 26. IV. Alberto Bobovski, Ali Bey-Haly Begh, nekonnata poliglota verkisto el XVII-a jarcento (J. Šustr). 10. V. Deklama kaj muzika vespero. 24. V. Pri deveno de la mondo (M. Pulchert). — En la industria lernejo Praha I. prof. inĝ. Josef Kochman instruas esperanton (laŭ tekstoj de inĝ. Krajčic) en du interes-rondoj. Partoprenas 35 lernantoj, en du duhoraj lecionoj ĉiusemajne.

**Přerov.** — E-kurson vizitas 23 p., instruas L. Kavková.

**Příbor.** - En esperanta rondeto en nacia kaj mezgrada knabina kaj knaba lernejoj gvidas instruadon Ant. Satték, lernejdirektoro, po du horoj semajne. Tiu rondeto estas aprobita de lerneja ofico en Nový Jičín kaj ankaŭ en Ostrava. En la rondeto estas 24 lernantoj. Ekde novembro funkcias ankaŭ esper. kurso por plenkreskuloj, kiu estas ĉiumerkrede po du horoj semajne; aliĝis 12 personoj, instruas A. Satték; ĝi estas organizita en kadro de Popola Vespera Lernejo.

**Rokycany.** — Loka grupo de EACSR malfermis la 18-an de oktobro kurson por komencantoj. Kunlaboris Distrikta kleriga akademio. Post intensa propagando per afiŝoj, per urba disaŭdigo ktp. aliĝis 53 interesuloj, kiuj estas instruataj en du klasoj. En ambaŭ instruas prezidanto de loka grupo A. Bašik. Tio estas jam dua kurso en Rokycany en jaro 1949.

**Rosice.** — Distrikta peranto prof. Rud. Dokoupil en Ivančice.

**Stěžery.** — En tiu vilaĝo estis aranĝita en januaro komencula kurso por 16 p., instruas laŭ la Ĉseh-metodo František Pytloun.

**Strakonice.** — Kurso por 36 komencantoj estis malfermita la 9. XI. 1949. La intereso sufiĉe bona.

**Trenčín.** — La 28-an de oktobro 1949 finiĝis la kursoj, kiujn gvidis s-anino Milda Jakubcová el Brno-Židenice. La kursojn finis 27 p. - La klubo kunvenas ĉiumerkrede en la Unua Knabina Mezlernejo je la 18—20 h. (E. S.)

**Trutnov.** — E-Klubo kun Distrikta Kleriga Konsilantaro invitis samideanon Josef Pech el Plzeň, ke li parolu pri siaj spertoj dum sia vojaĝo en Proksima Oriento. La parolado okazis la 2-an de decembro en Národní dům, malfermis ĝin faka instruisto František Toman. Ĉe la tribuno estis grandaj afiŝoj: Lernu Esperanton! Josef Pech montris 200 lumbildojn kaj aldonis pliajn bildojn pri Parizo, kie okazos en 1950 la Universala E-Kongreso. La sukceso de la parolado antaŭdiras plej bonan esperon por estonta laboro. - La loka grupo havis sian jarkunvenon la 10-an de januaro 1950. Prez. Fr. Toman; sekr. Stan. Samek, Blanická 5; kas. Jarm. Kálenká. Kunvenoj ĉiumarde en Národní dům. - La trimonata kurso komencita en oktobro (aranĝita sub la patroneco de Lingva Lernejo) finiĝis kun 18 p. Instruis Karel Kopecký. La membroj ricevis dum 1949 205 lerojn kaj fondendis 262. La grupo intencas aranĝi esperanto-ekspozicion.

**Třebíč.** — Depost la 19-a de oktobro kuras sesmonata kurso, kiun aranĝas la loka grupo kaj la Distrikta Kleriga Konsilantaro. La kurson vizitas 28 partoprenantoj, plejparte ĝejunuloj; gvidas ĝin Th. Kilian.

**Třebíč-Borovina.** — Juna, sed ege oferema kaj esperiga s-anino Kamila Lampířová gvidas samtempe duan kurson, kiun vizitas 26 plejparte junaj ĝelaboristoj de la ŝufabrika de G. Kliment. Estas notinde, ke s-anino Lampířová, kiu estas „novbakita“ unujara Esperantistino, gvidas sian unuan Esperanto-kurson kun rimarkinda lerteco. Jen imitinda ekzemplo! (li)

**Uherské Hradiště.** — Laŭ instigo de redaktoro Jan Zeman, fondinto de la E-klubo en Jihlava, kunvenis post paŭzo pli ol duonjara la 12-an de decembro la membroj de Slovaka klubo esperantista en Uherské Hradiště. Interkonsentita por januaro aranĝo de E-kurso por komencantoj, kiun gvidos M. Vilémová, en kurso por progresintoj instruos J. Zeman, gvidanta redaktoro de Zemědělské noviny. La klubo kunvenas denove regule ĉiun semajnon. (re)

**Úpice.** — E-klubo komune kun Distrikta Kleriga Konsilantaro aranĝis la 1-an de decembro paroladon de Josef Pech el Plzeň pri lia vojaĝo de Nigra maro tra Malgranda Azio kaj Palestino en Egipton. En ornamita salonego montris la preleganto 200 lumbildojn kaj bonege propagandis nian lingvon. Antaŭ la parolado interesis la publikon pri E. faka instruisto Karel Kopecký. La 2-an

de decembro okazis la sama parolado en loka mezlernejo al 380 gelnantoj. La aranĝintoj kaj la aŭskultintoj estis tre kontentaj.

**Veseli n. Mor.** — La Klubo eldonis 10 kartojn kun fotografajoj de moravi-slovakaj popolkostumoj kun esperantlingvaj klarigoj. Liveras ilin en ornamita koverto por 29 Kčs la klubo.

## RICEVITAJ LIBROJ

**Ján Valaštan Dolinský: Velká slovenská učebnica mezinárodní reči esperanto.** Nákladom: Riaditeľstva pre cestovný ruch pri PPO v Bratislave. Publikácia Slovakotour u miestného sboru pre cestovný ruch v Trenčine 1940. Granda slovak lernolibro de la internacia lingvo Esperanto. Eldonis: Direkcio por fremdultrafiko ĉe KIK en Bratislava. Publikajo de Slovakotour, loka grupo por fremdultrafiko en Trenčín 1949. — 128 paĝoj 15×21 cm. Prezo 65 Kčs. — La movado ricevas per tiu libro helpilon tre detalan. Sur 8 paĝoj estis donita unua parto de la eperanta gramatiko, en kiu preskaŭ du paĝoj estas dediĉitaj al akcento kun kelkaj asertoj, kiuj estas personaj opinioj de la aŭtoro, kaj ne ĉiuj konsentos kun li. Sekvas ĉefa parto konsistanta el „Ekzercoj“ (sume 20). En ĉiu ekzerco estas longa listo de novaj vortoj kaj modelaj propozicioj. Krome enestas tekstoj kontinuaj kaj pluraj ekzercaj taskoj por traduki el la slovak. En la fino de la libro estas la taskoj tradukitaj. La ekzercoj estas sur paĝoj 19—100, poste sekvas dua parto de la gramatiko sur 16 paĝoj. — La klera aŭtoro dediĉis al sia nova lernolibro grandan zorgon. La foliumado en ĝi estas same agrabla kiel ĝia atenta legado. Ankaŭ sperta esperantisto trovos en la libro detalojn, kiuj igos pensi pri diversaj problemoj kaj problemetoj de nia gramatiko kaj precipe pri la stilo. Ankaŭ bela preso kaj tre bona papero agrabligos uzadon de la libro. Ĝi estos utila ankaŭ al ĉeĥaj esperantistoj, precipe tiuj, kiuj gvidos kursojn trovos en la nova lernolibro multajn uzeblajn detalojn.

**Brulanta Sekreto kaj aliaj rakontoj de Stefan Zweig.** El la germana lingvo esperantigis Kathe R. Schwerin kaj Paul E. Schwerin. La „Epoko“ libroj vol. IX. 1949. The Esperanto-Publishing Co Ltd. Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo. 160 paĝoj 12×19 cm. — La tre plaĉe presita libro enhavas krom la Brulanta sekreto ankoraŭ Epizodo de la Geneva Lago, La Batalo pri la Suda Poluso, La Reĝa Ludo. Versimile ili estas ordigitaj kronologie laŭ jaroj de sia apero. Mi estus tre ŝatinta, se oni trovus tiujn jarojn en la libro. La unua rakonto jam antikviĝis: komplikaj kaj infandoloroj ĉirkaŭ sensignifa amaventuro de nekuraĝa edzino kun iu enuiganta barono ĉesis interesi multajn. Kontraŭe relego de la fama rerakonto pri Scott-vojaĝo al la Suda poluso neniom perdis el sia forteco. La dua kaj la lasta rakontoj temas pri strangaj okazintaĝoj kaŭzitaĝ de la unua kaj de la dua mondmilitoj. Mi nur el tiu ĉi libro sciigis, ke Stefan Zweig, la eminenta Wiener verkisto, kiu sukcesis konservi en siaj verkoj tre diversan etoson el sia epoko kaj ĉiam sintenon de homo klera, ŝatanta homaranajn virtojn, el kiuj la plej alta estas respekti la homan individuecon, elpelita de naziistoj el Aŭstrio, tramiĝis Anglujon kaj Usonon kaj fine Brazilon, ĉie trovante honorojn kaj laboreblecojn, tamen memmortigis sin en Brazilo la 22. 2. 1942. En la „Adiaŭa letero“ enpresita en fino de la libro li proklamas „Mi salutas ĉiujn miajn amikojn! Ili vidu ankoraŭ la matenuĝon post la longa nokto! Mi, tro malpacienca, ilin antaŭiras“. La libro estas tre leginda. Pro la rakontoj de eminenta aŭtoro mem, sed same pro la tre bona traduklingvaĵo. La tradukintoj klopodis sukcese konservi artisman karakteron de la Zweiga stilo. Tamen ili parolas per lingvaĵo tre klara kaj tre facile legebla. Ili evitas neologismojn kaj klopodas sukcese redoni la karakterizajn ecojn de la stilo per pure esperanta materialo. Jen kelkaj el la simplaj parolturnoj kaj vortoj, kiu ŝajnas simplaj, kiam jam unufoje diritaj: Ĉevaloj laŭtrotis suprenan vojon. Malsingarda. Altsituata hotelo. Ne malokazas fatalaĵoj. Movos figurojn antaŭen kaj malen. Memfaritulo (svojsilan). Subakvigisto (potápěč). Ekzistas nenio por deigi min de miaj pensoj. Fordoni min kaj miajn pensojn. Malbonsigna tago. Ktp. La tradukintoj vivas en Sydney. Ili estu satutiĝaj.

**Jarlibro de la Universala Esperanto-Asocio 1949. Dua parto.** UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo. 69 paĝoj 11×16 cm. Nur por uzo de membroj. — En kutima plaĉa aranĝo aperis tiu nemaljuniĝanta jarlibro. En tiu ĉi kajero precipe leginda estas Raporto de la Estraro de UEA el julio 1949. Ĝi estas kompilita tre taŭge kaj meritas atentan tegadon. Tiun ĉi jaron ni povas kun aparta ĝojo saluti aperon de plua terminaro, kies ellason en 1948 ni sentis dolore. Tiun ĉi jaron aperas ampleksa **Marista Terminaro** (Parto I) de Komandanto Peter Clissold, D. B. E. A., 32 paĝoj, kun ilustraĵoj. Foliuminte la tekston mi trovas la difinojn faritajn de efektiva spertulo. Estas agrabla tia renkontiĝo. Tamen li permesu al mi konstati, ke sur p. 31 mi preferus diri pri Greniĉa Meridiano: La Nulo-meridiano.

**Manuel Fernandez Menendez: Valor educativo del Esperanto.** Estudio ilustrado con 10 fotografados. Imprenta Nacional Montevideo. (Ce la aŭtoro: Calle 21 de Setiembre 2453.) 40 paĝoj 17×26 cm. — La bele presita broŝuro traktas hispanlingve pri eduka valoro de Esperanto. La aŭtoro dividis la temon en mallongajn ĉapitrojn, kiuj tre bone kaj konvinke redonas faktojn kaj konkludojn el ili. Tre bone estas elektitaj la 10 bildoj, kiuj pro sia tre diversa origino bone ilustras la internaciecon de nia movado kaj finfine ankaŭ nian tradicion, kiu komenciĝas ja esti jam efektiva tradicio, ĉar multo okazis dum tiuj 60 jaroj. La samideanoj el Urugvaĵo povas esti kontentaj pri tiel saĝa propaganda, pli bone dirite tiom instrua broŝuro.

**El Esperanto en opinion de hombres eminentes y diversos Hechos.** Compilación y comentarios por el profesor M. Fernández Menéndez. 2-a edición aumentada. Editó „La bona semisto“, Montevideo. 32 paĝoj 10×15 cm. — Bela broŝuro hispanlingva, kiu redonas aprobajn deklarojn de diversnaciaj eminentuloj pri Esperanto aŭ pri lingvo internacia. Enestas multaj deklaroj konataj, sed sed ankaŭ multaj por ni novaj. Ankaŭ estas aldonitaj deklaroj de diversaj kongresoj. La unua eldono de tiu ĉi libreto aperis en marto 1947, la dua jam en septembro 1949. Ĝi dokumentas ĝoĝigan vicleĝon de poresperanta agado en Urugvaĵo, el kiu certe ankaŭ profitas la movado en ĉiuj ceteraj hispanlingvaj landoj. Dankon kaj gratulon al tieaj samideanoj!

**Esperantista Poŝkalendario 1950.** Eldono de EAĈSR, klubo en Hradec Králové. 130 paĝoj 9×12 cm. Prezo 35 Kčs. — Nia fervora klubo aperigis la kalendaron ankoraŭ por tiu ĉi jaro. Krom la kutima enhavo, tre bele presita, ĝi enhavas ĉeĥan koncizan gramatikon de nia lingvo kun ĉiuj prefiksoj kaj sufiksoj kaj represon de nia informilo organiza. La esperantlingvaj rubrikaj por la tagaj enskriboj estas tre bone aranĝitaj, sur bona papero, oni uzos ilin kun plezuro por noti datojn de rendezuoj, esperantistaj kunvenoj, kotizopagoj ktp. La ekstera aranĝo (tre taŭga bindo) meritas ankaŭ laŭdon sinceran.

Rudolf Hromada:

*Slovník česko-esperantský*

188 stran. Cena Kčs 47,50 vyplaceně.

Objednejte pro členy klubů a pro účastníky kursů.

# SCIIGOJ

**La Radiodiffusion Francaise**, Esperanto-Sekcio, elsendas en Esperanto ekde 2-a de Oktobro ĉiutage sur nova mallonga ondo: 48,82 m (6.145 Kc). — La horo restas ne ŝanĝita: 18,15—18,30 h (franca horo = 19,15—19,30 MET). Aŭskultu kaj konfirmu la aŭdon laŭ la adreso 118 Champs Elysées, Paris VIII.

**Tutmonda adresaro de la esperantistoj (TAE) 1950.** — Aperdato: 17-a de Aprilo 1950. — Limdato por ensendoj: 15-a de Marto 1950. — Kotizoj: a) Simpla enpreso de la adreso kun eventuale 5-vorta anonceto kiel „20-j. fraŭlino deziras edziniĝi“ aŭ „Del. de UEA, SAT, IKUE“ aŭ „Ne korespondas“ aŭ „kolektas poŝtmarkojn kaj ilustr. poŝtkartojn“ ktp. nur 2 intern. poŝtrespondkuponojn (rk). Familiano kun sama adreso sen anonco nur 1 rk. Por pliaj 5 vortoj en la anonco plua 1 rk. — b) Mendo de TAE mem nur 10 rk; estos presataj nur la menditaj ekzempleroj. Tial tuj metu ĉe Int. Esperanto-Muzeo en Wien, I, Hofburg, Batthyanystrasse, Aŭstrio. — Sed niaj legantoj atentu, ke ni ne povas akcepti pagojn por tiu ĉi adresaro! Sumoj jam pagitaj estas je dispono de la pagintoj.

**Kiel enkonduki Esperanton ĉe Sindikata Monda Federacio (F. S. M.).** Konsiderinte, ke la esperantista celo estas enkonduko de nia lingvo en gravaj internaciaj organizoj, ni, esperantistaj sindikatoj, unuigas niajn fortojn por trafi tiun celon ĉe F. S. M. — Ni konstatis, ke klopodoj, faritaj rekte al la estraroj, ĉiam malsukcesis, ĉu pro malfavoro de tiuj estraroj al Esperanto, ĉu pli ofte pro kontraŭbatalo de idistoj, okcidentalistoj, Basic english-istoj... Pro tio ni decidis agadi per nia lingvo kaj pravi pere de la faritaĵoj ĝian taŭgecon. Tio estas farebla ĉe F. S. M., ĉar ni povas efektiviĝi plenumendajn taskojn de tiu organizo, neniam trafitajn ĝis nun, nome: Eduki ĝiajn anojn, naski ĉe ili internacian solidarecon, unuigi ilin por la sindikata agado. — Eduki la anojn. Ni efektiviĝos parte tion dank' al nia bulteno, kiu sciigos al niaj kamaradoj sindikatajn novaĵojn el la tuta mondo, diversajn doktrinojn kaj vidpunktojn en ĝia rubriko „Libera tribuno“, tiamaniere ni havigos juĝeblecon al multaj homoj, kiuj konas nur unu ideon, la sian. — Internacisolidareco. (Ĝi naskiĝos nur per internaciaj renkontoj, legado, korespondado, t. e. nur per Esperanto. — Unuigi la laboristojn por la agado. Ni efektiviĝos morale tiun taskon instigante ĉiam la legantojn de nia gazeto „Esperantista Sindikato“ al malakcepto de la divido, konsciigante ilin pri nevenkebleco de la unuiginta laboristaro. Tiel ni plenumos la plej efikan kondiĉon por firmigi la pacon. — Ni estas certaj, ke tiu peresperanta agado rapide aliformiĝos al poresperanta, ĉar ni tradukos nian bultenon nacilingven, ampleksigante nian agadon al la neesperantistoj. Tiel ni kompreniĝos al ili la neceson de nia lingvo kaj ilin ni varbos. F. S. M. anoj, aniĝu al Sindika Esperantista Asocio Tutmonda (SEAT). — Ĉiuj sindikatoj, kia ajn estas via organizo, sciigu viajn ideojn al SEAT 20 rue de Béquet - Bègles - Gironde, Francio.

**Internacia Junulara Laborbrigado** estas projektata de la Junulara Fakto ĉe nia Asocio dum somero 1950 en Altaj Tatroj. Estas proponata agrabla medio, bonaj laborkondiĉoj kaj riĉa kultura programo. — Laŭ la lasthora informo la laborbrigado ne okazos, ĉar la Centra organizo de la ĉs. junularo ne donis sian aprobon.

**Ĉeĥan artikolon pri occidental „Také occidentalisté“** el 8-a numero de nia pasinta jarkolekto ni aperigis sur aparta folio, kiu estas je dispono al niaj membroj, kiuj povas ĝin sendi al taŭga adreso.

**La konsumkoopero kaj la ekonomia vivo de Svedujo.** Tio estas la titolo de nova broŝuro, eldonita de la sveda Koopera Federacio. (Ĝi estas verkita de la direktoro de la Internacia Koopera Alianco, s-ro Th. Odhe. La fama esperanto-verkisto Stellan Engholm faris la esperantan tradukon, kio estas garantio pri la bona esperantostilo de la teksto. Ĝi ampleksas 20 pagojn kaj estas tre bele ilustrita per multaj fotografiaĵoj. Vi ricevos ĝin senpage. Mendu ĉe Kooperativa Federacio, Stockholm 15, Svedujo.

**Ĉu la radiostacioj elsendu plu en Esperanto?** Elsendante en iu nacia lingvo ĉiu radiostacio scias, ke ĝi parolas al nacio ekzistanta. Elsendante en Internacia lingvo ili postulas konfirmon, ke iliaj elsendoj estas aŭskultataj. Tiaj konfirmoj estas leteroj de la aŭskultantoj. De ilia nombro kutime dependas la plua sorto de la elsendoj. — La Ĉeĥoslovaka radio montras ĝis nun la plej grandan komprenon por esperantlingva informado, el ĉiuj radiostacioj de la mondo. Ĝi uzas Esperanton laŭ pli granda skalo ol la lingvojn francan, polan, germanan, bulgaran, hungaran, italan, rumanan, grekan, svedan, danan kaj norvegan, en kiuj ĝi ankaŭ elsendas. Tio estas afero senkompara en la Esperanta historio.

„Ĉu venas aŭskultraportoj?“ demandas la respondeculoj. Estas en via povo, karaj samideanoj, kia estos la respondo. Sufiĉas, se vi skribos la adreson kaj kelkajn vortojn. Skribu al ĉiu stacio, parolanta en Esperanto, kaj ne forgesu ankaŭ la Ĉeĥoslovakian Radion en Praha XII, Stalinova 12.

**La 23-a SAT-kongreso** okazos la 29-an de julio—4-an de aŭgusto 1950 en Torino. Kotizoj por SAT-anoj 1,75 dolaroj (aŭ ekvalento en enlanda mono). Post la 1-a de majo 2,25 dol. Ne-SAT-anoj 2,25 kaj 2,75 dol. Ĉiujn korespondantojn adresu al Guzzi Marjo, Via Modena 33, Torino (Italujo).

**Aŭstria Esperanto-Kongreso 1950** okazos en la tagoj de 27-a ĝis 30-a de majo en Vieno. Ĉeĥoslovakaj esperantistoj estas invitataj partopreni senkotize. Informojn por 1 respondkup. donas Loka Kongresa Komitato, Neutorg. 9, Wien I.

**35-a Universala Kongreso en Parizo, 5.—12. aŭgusto 1950.** Informoj pri loĝejoj: Estas malfacile rezervigi hotelĉambrojn en Parizo, sed ni tamen faros nian eblon por kontentigi la mendantojn. Jen la nunaj prezoj kaj ni esperas, ke la hoteloj ne plialtiĝos siajn prezojn ĝis la Kongreso: Arango A. Hotelo - ĉambro por unu persono a) ĉambro kun granda lito b) ĉambro kun du litoj c). Kategorio 1: a) 1200 fr., b) 1400 fr., c) 1600 fr. Kategorio 2: a) 750 fr., b) 850 fr., c) 1000 fr. Kategorio 3: a) 450 fr., b) 500 fr., c) 600 fr. La prezoj estas por unu nokto kun la servmono enkalkulita, sed neniu manĝo. La prezoj indikitaj sub b) kaj c) validas por 2 personoj en unu ĉambro dum unu nokto. — Arango B. Kun-resteĝo. Kategorio 4: Lito kun matenmanĝo 150 fr. Kategorio 5: Lito kun matenmanĝo kaj tagmanĝo aŭ vespermanĝo 400 fr. Kategorio 6: Lito kun 3 manĝoj 650 fr. La Kun-resteĝo estas en parizaj liceoj kaj superaj lernejoj. Ĉiu ricevos sian propran liton kun matraco, lankovrilo, kapkuseno kaj litukoj. La Kun-resteĝo troviĝos proksimume je 10 minutoj piede de la Kongresejo. — Arango C. Tendo propra. Kategorio 7: Sen iu manĝo (por ĉiu persono) 50 fr. Kategorio 8: Kun matenmanĝo 100 fr. Kategorio 9: Kun matenmanĝo kaj tagmanĝo aŭ vespermanĝo 350 fr. Kategorio 10: Kun 3 manĝoj 600 fr. La tendarejo troviĝos en bela granda parko je sep minutoj de subtera fervoja stacio. La veturo ĝis la Kongresejo daŭras proksimume 20 minutojn. — Manĝado. Loĝantoj en hoteloj povos manĝi laŭplaĉe en iu restoracio proksime al la Kongresejo elspezante de 250 ĝis 1500 fr. Sufiĉe kontentiga manĝo kostas proksimume 350 fr. kaj matenmanĝo 100 fr. Al tiu prezo oni devas alkalkuli servmonon, ekz. 10% aŭ 15%. — Ĝis 31. XII. 1949 aliĝis precize 1000 personoj.

## VELKÝ SLOVNÍK ČESKO-ESPERANTSKÝ OD BRATŘÍ FILIPŮ

656 stran, v plátně váz., již rozesíláme. Cena 390 Kčs, poštovné (doporuč.) 11 Kčs. - Objednejte u Knihkupectví Svazu esperantistů ČSR, Praha, poukazem na jeho účet psp. čís. 12.371.



Esperanto-ekspozicio en Brno-Židenice.

## ESPERANTISTA VIVO

**Edziĝo.** František Kastner kaj Marie Bittnerová en Plzeň la 31-an de decembro 1949.

**Edziĝo.** Linhart Rýznar el Čtyřicet Lánů kaj f-ino Kučařová el Krhov la 1-an de oktobro 1949.

**Edziĝo.** Pavel Rosa, prezidanto de Slovaka Esperanto-Societo, en Bratislava, multjara kunlaboranto en nia movado en Slovakujo, kaj Eta Harilová, la 26-an de decembro 1949.

**Edziĝo.** Josef Reiser, regiona peranto en Plzeň, kaj Růža Šrámková, la 26-an de decembro 1949 en Lomeček.

**Ora edziĝo-festo.** Gesinjoroj Kremer en Košice (Trnava) festis la 26. XII. 1949 sian 50-jaran geedziĝo-jubileon. Ili akceptu salutojn kaj ili ĝojigu nin per ebleco ripeti la gratulojn ankoraŭ multfoje.

Ĉiuj novaj edzaj paroj akceptu amikajn salutojn!

**Mortis Ant. Malík,** fervojisto en Předmostí ap. Přerov, la 18. I. 1950, 79 jarojn aĝa, patro de nia prezidanto. La filo akceptu nian sinceran kondolencon!

**Pasis unu jaro depost morto de mia patro František Kotrba** el Kašperské Hory. Li estis bona homo kaj montris al mi kaj al aliaj homoj vojon al Esperanto. Mi petas ĉiujn, kiuj lin konis, ke ili dediĉu silentan rememoron al li. Emil Kotrba, filo. En Kašper. Hory 15. XII. 49.

**Mortis Václav Ezechel,** nia membro, 16 jarojn aĝa, en Ústí n. L.-Bukov, pro akcidento en fabrikejo, kie li laboris, la 11. X. 1949. Li estis tre fervora esperantisto, nelacigebla aganto en la loka grupo. Rememoro pri li estu instigo por multaj kaj la gepatroj akceptu esprimon de nia profunda kunsento.

**Mortis Bohumil Kaiser,** ŝtata profesoro en Praha, subite, la 29. XI. 1949, nia fidela membro kaj fervora samideano. La familio akceptu nian sinceran kondolencon.

**Mortis MUDro Vilhelmo Austerlitz,** kuracisto en Bardejov, 76-jara, la 27-an de novembro 1949. Li estis unu el la plej malnovaj pioniroj, kiu estis aktiva jam antaŭ la unua mondmilito.

**Mortis Jarmila Kučerová,** bona samideanino en Hradec Králové, la 30-an de decembro 1949, nur 38-jara. Ĉe kremacio adiaŭis ŝin en nomo de la Asocio s-o Frant. Pytloun.

## Librovendejo de EAĈSR — povas tuj liveri:

Th. Ĉejka a J. Krumpholtz: Esperanto. Podrobná mluvnice. Kelkaj ekzempleroj (2,50)	Kĉs 20,—
A. Silha: Krátká učebnice esperanta (1,50)	4,—
J. Šupichová: Hovoříme esperantsky (2,50)	28,—
Rud. Hromada: Slovník česko-esperantský (2,50)	45,—
Wörterbuch-Bausteine (2,)	2,—
W. E. Collinson: Esperanto a jeho kritikové	2,—
Kotzin: Na obranu esperanta	2,—
Dr Tom. Pumpr: Česká a slovenská literatura v esperantu	2,—
O zkouškách z esperanta	10,—
Gramatika esperanta na kor. listku	1,80
Ginz: Esperanto na pošt. cenninách	1,—
Češoslovaka Konstitucio (sole por eksterlandaj esperantistoj, senpage aŭ por 1 respondkup.)	
Lerneja reformo en ĈSR (sole por eksterlandaj esperantistoj, senpage aŭ por 1 respondkup.)	
Absolon: Moravia Karsto (2,50)	10,—
St. Schulhof: Bohemaj grenatoj (1,50)	15,—
J. a K, Filipové: Kantareto (2,50)	45,—
Propaganda afiŝeto multkolora	3,—
Kartona afiŝeto (1,50)	5,—
Aliĝilo al Esperanto-kurso 100 ekz. (4,—)	35,—
Stacidoma tabulo el lado, uzebila ankaŭ por klubejo (6,—)	100,—
Leterpapero kun koverto	1,—
Leterpapero kun koverto, aerpoŝta	1,50
Poŝtkarto	—,30
Poŝtkarto kun portreto de Zamenhof	1,20
Glumarkoj	1,— aŭ 3,50
Glumarkoj de nia kongreso en Liberec 20 ekz.	12,—
Esperantista poŝkalendaro 1950 (1,50)	35,—
Emajlita ŝildo „Esperanto parolata“ (2,50)	33,—
Dolinský: Velká sloven. učeb. esperanta (2,50)	65,—
J. Šupichová: Kdo je Zamenhof (1,50)	6,—
Historia skizo de UEA 1908—1933 (1,50)	4,—
J. Novák: J. A. Komenský	2,50
Filipová: Velký slovník česko-esperantský (11,—)	390,—
Atesto (por kursistoj)	4,—
Poŝtkarto „Printempan saluton“ de Toyen	1,20
Insigno malgranda	12,—
Insigno festa kun flago	25,—
Al la prezo aldonu afrankon, notitan inter krampoj. — Kiam ne estas notita, tiam minimume 80 helerojn.	

### Esperantista poŝkalendaro 1950

vekis grandan intereson ĉe samideanoj en la tuta mondo. Ĉar la eldonkvanto estas limigita, rapidu per via mendo. Ĝi estas ankoraŭ havebla por Kĉs 35.— plus Kĉs 1,50 afranko ĉe Esperanto Asocio ĈSR, Malá Štěpánská 7, Praha II, aŭ ĉe Esperantista Klubo, Zamenhofova 1010, Hradec Králové II.

**Literatura Mondo.** Ni esperas, ke ni povos doni post nelonga tempo definitivan informon al abonintoj de la jarkolekto 1949. En 1950 ĝi ne aperos.

**ESPERANTOLOGIO.** Ne alvenis la promesita kvanto de tiu revuo kaj ni ne povas garantii, ke ni liveros al ĉiuj pagintoj. Bonvolu pacienci!

### Nový způsob odesílání poštovních zásilek do ciziny

Od 1. února se podávají poštovní zásilky do ciziny jediné u přepážek poštovních úřadů nebo u přespolních listonošů. Na všech těchto zásilkách musí být adresa odesílatelova a podatel se při podání zásilky prokáže občanským průkazem nebo úřední legitimací. Toto opatření se týká všech druhů poštovních zásilek. Zásilky do ciziny podané do schránky se vrátí odesílatelům nebo se s nimi naloží jako se zásilkami neodbytnými.

## ČESKÉ LISTY O ESPERANTU

**Esperanto - živý jazyk.** V Tribuně L. D. byl nedávno uveřejněn dopis occidentalisty J. P. z Rovenska, v němž útočil na mezinárodní jazyk esperanto a jehož obsahem byli čtenáři L. D. mystifikováni. - Podotýkáme, že to byl právě SSSR, od něhož se dostalo esperantu jednoho z největších ocenění, rovnajícího se téměř oficiálnímu uznání (m. j. pošt. známky a cenniny s esperantským textem a motivy). Francouzská akademie věd vydala r. 1921 prohlášení, v němž nazývá esperanto „mistrovským dílem logiky a jednoduchosti“. Rada učenců a slavných literátů se vyjádřila s obdivem o kvalitách esperanta, mezi nimi Max Müller, Tolstoj, H. Phillips, Gorkij, E. Lombard, I. E. Naville, J. E. B. Mayor, H. Barbusse, R. Rolland, nedávno host ČSR T. Pavlov, předseda Bulharské akademie věd, a j. Theoretická úvaha prof. Trávníčka, na kterou se pisatel odvolává, jest ze základu vyvrácena sovětským akademikem N. J. Marrem, stoupencem nové teorie o podstatě a vzniku lidské řeči. — Esperantská literatura má již 12 tisíc svazků původních i přeložených děl, kdežto occidentalistická po 27letém trvání se omezuje na několik desítek knih, jen učebnic. — „Čím více se dívám na occidental, tím pošetilejší se mi zdají jeho hlasité vytrubované nároky. Nepravdivostí a zrůdností jej činí úplně nevhodným pro nelingvisty, zejména pro nerománské,“ praví W. E. Collinson, prof. germanistiky na universitě v Liverpoolu. „V occidentalu nelingvista je odpuzován přemírou národních zmatenín a lingvista je odpuzován nedostatkem poučení, kdy úplně mezinárodní slovo je přípustné a kdy nikoliv.“ — Vyslovujeme jménem čs. esperantistů rozhořčení nad nepravdivým útokem p. J. P. z Rovenska. uveřejněného v L. D. 22. X. Prohlašujeme, že podobná činnost jen ještě více stmelí naše řady, bojující za světový mír a pokrok. Veškerá theoretická diskuse je planá — esperanto funguje! — Svaz esperantistů ČSR. (Lidová demokracie z 26. XI.)

K tomu bychom ještě aspoň poznamenali, že zatím co occidentalisté jest na světě asi pět set, z toho asi dvacet v ČSR, letošních esperantských sjezdů jen v Evropě pořádaných se zúčastnilo více než 10.000 delegátů, přes omezené možnosti cestování. Stoupenci occidentalu, vytvořeného německých šlechticem E. von Wahlem, se snaží v poslední době zastříti jeho pravou tvář krvácím jménem „interlingue“. Occidentalisté ještě se nedostali ze stadia theoretického diskutování, zatím co esperanto již po desetiletí prokazuje praktické, mnohdy neocenitelné služby.

**Lidové noviny** přinesly 1. I. 1950 v Jazykovém zákam-pí článek p. prof. Trávníčka „Esperanto a světový mír“, v němž popírá i možnost, že by esperanto mohlo nějak přispěti k světovému míru. Dopisy, jež pan profesor dostal po svém posledním článku, ho nepřesvědčily.

Redakce i pan profesor dostali jistě opět řadu nesouhlasných dopisů. Z jednoho z nich, jež jsme dostali v průpisu, citujeme závěr: „Pan Trávníček mermomocí bojuje o čestné místo mezi těmi, kteří kaceřovali a posmívali se Divišovi, Stephensonovi, Kolumbovi, Mičurinovi a jiným, Budete je mít, nezmění-li své stanovisko. (A. St.)“

**Esperantská publikace o školské reformě v ČSR.** Ústav esperantské služby v Praze vydal po Československé ústavě další esperantskou publikaci. Je jí 60stránkové dílko „Školská reforma v Československu“, jejímiž autory jsou Jar. Mařík a dr. T. Pumpr. Knížka obsahuje výklad ministra školství a osvěty Zd. Nejedlého, úplný text zákona, komentář k zákonu od J. Paura. (Nová politika, Brno 4. X. 1949.)

**Esperantská resumé ve vědeckých publikacích.** Čím dál tím častěji se objevují esperantská resumé ve vědeckých publikacích, v Holandsku se rozhodla Královská akademie věd, že zavede esperantské obsahy článků ve svém časopise „Proceedings“. Několik takových článků od prof. J. M. Burgerse z Delftu bylo již otištěno. V Itálii vyšla důležitá kniha z oboru soudního lékařství „Lidský vlas jako rozpoznávací prvek“ od prof. Giorgio Canuta z Parmy, která má také esperantské resumé. Ve Finsku použila esperanta v nejnovější mathematical studii astronomická observatoř university v Turku. Dánská fytopathologická laboratoř J. E. Ohlsens-Enkese vydala dvě publikace

s esperantskými obsahy. V Norsku vyšla tak zoologická studie od J. P. Stop-Bowitze, který už před tím publikoval stejným způsobem několik svých prací. (Práce, Gottwaldov 24. IX. 49.)

**Esperanto ve vědeckém časopise.** Ve významném japonském fyzikálním časopise Progress of Theoretical Physics vyšel 8stránkový článek „O železomagnetismu podle slitinové teorie“, sepsaný v esperantu Kei Yosidem a Syohei Miyaharou. Nad článkem je 7řádkové resumé v angličtině. Další, dvoustránkový, esperantský článek bez resumé v témže listě napsal F. J. Belinfante. Je to po vědeckých publikacích, vydaných v poslední době v Brazílii, v Holandsku a jinde důkaz seriosního používání mezinárodní řeči na poli vědeckém. (Práce, Brno 28. VI. 49.)

## KORESPONDI DEZIRAS

Vlastislav Šitta, studento de komerca akademio, **Dražice** u Tábora 106 kun austria kaj norvega studento aŭ studentino.

Seinosuko Kato, 36-jara komunuma oficisto, **Čiriu-mači**, Aiči-ken, Japanujo, pri ĉiuj temoj.

Nobuo Yamaki, 17-jara studento, **Wakamiko**, Yamana-si-ken, Japanujo, per let. kaj il. pk., intš. pm.

Hideo Sugita, 37-jara pentristo, 131 Marusima-Jutaku, Marusima-tyo, **Miyazaki**, Japanujo, pri ĉiuj temoj kaj intš. esp. gazetojn.

F-ino H. Bremer, Gagelsweg 82, **Steenwijk**, Nederlando.

H. J. Bakker, Zilverlaan 78, **Wolvega**, Nederlando.

Josef Cink, 17-jara studento, Albrechtice 47, p. **Lanškroun**, kun ĉiuj landoj.

17-jara direktanto por resanulejoj de junularo volas intš. pk. kaj let. pri ĉiuj temoj kun geesp. el ĉiuj landoj. Josef Novák, Haraticice 14, p. **Plavy**.

Esperantista rondeto, **Určice** - Prostějov, ČSR — 21 geknaboj 13 ĝis 15-jaraj, studentaj en mezlernejo, serĉas gekorespondantojn el ĉiuj landoj.

22 bulgaraj gekursanoj dez. koresp. kun gejunuloj ĉe-ĥoslovakaj. Letervespero 3-an de marto. Nepre skribu. Esperanto-Societo, **Berievo**, Sevlievsko, Bulgarujo.

Václav Kopecký, III-a internato 315, **Gottwaldov 1**, kun gesamideanoj el la tuta mondo.

Paŭlo Balkányi, bankoficisto, M. Nemzeti Bank, Péncz. O, **Budapest 54**, Hungarujo, kun bankoficistoj-sindikatanoj.

M. Yoshimoto, No 22, Minamikasuga-cho, Sai Ukio-ku, **Kioto**, Japanujo, 20-jara, kun studentoj kaj laboristoj.

Dimitër Donev Dimitrov, vilaĝo **Brenica**, ok. Belo-Glatska, Bulgarujo, interš. PM, Pl, 22-jara.

Ludvík Málek, **Vápenný Podol 35**, ČSR, koresp. kaj intš. PM Pl.

Karolo Piĉ:

## PLUVAS

*Bulvardon trempas griza pluv'  
kaj tramo post angulo tintas;  
nebulo hejmpasantojn vindas;  
la urbo estas granda nigra kuv',*

*el kiu la noktmezo sonas;  
kie gaslampoj lace dronas,  
kaj kie nokto kiel ĉerk'  
naĝas tra vate mola nebulsterk'.*

*Nur iu tie ion krias ...  
Ĉu vi komprenas? Vi ne scias ...  
Nenio. Pluvas. Pluvas sen alarm';*

*kaj pavimbrikoj akve brilas;  
mil dratoj tremas kaj oscilas ...  
Pluvas ... Post ĉiu guto pluvas larm' ...*

## ATENTU!

La lernolibro de prof. Kilian ne povas esti ankoraŭ liverata. 5000 ekz. kuŝas ĉe la eldonfirmo atendante la decidon de la Nacia Konsilantaro pri la Libroeldonado.

La kotizo asocia por 1950 estas 100 Kĉs (junuloj, soldatoj 50 Kĉs, familianoj 25 Kĉs). Se en via loko ekzistas loka grupo de nia Asocio, ni rekomendas al vi aliĝi al la Asocio pere de tiu grupo.

Por varbado uzu la 4-paĝan flugfolion Esperanto - ĵednotné jazykové pojtko národů. Mendu 10 ekz. por 8 Kĉs, 100 ekz. por 70 Kĉs.

La ĉeĥa-esperanta vortaro de Rudolf Hromada, eldonita de la Asocio kaj sendata po 45 Kĉs plus Kĉs 2,50 afranko, estis tiel rapide vendata, ke restas nur unu kvarono de la eldona kvanto. Nova eldono estas preparata. La prezo 15 Kĉs por membroj de la Asocio rilatas al tiuj membroj, kiuj mendis la vortaron en la jaro 1947, kiam la vortaro estis aperanta kiel aldono al nia gazeto.

La regionaj perantoj ricevis adresojn de ĉiuj asociaj membroj de sia regiono por kontroli. Kiuj ne resendis al nia oficejo la kontrolitan duan ekzempleron de la adresoj, tiuj bonvolu fari tion kiel eble plej baldaŭ.

Se vi aranĝas kurson, ne forgesu informi nin pri tio, informante samtempe pri tio, kiu aranĝas la kurson (ĉu la klubo mem aŭ la klubo kun Kleriga konsilantaro aŭ kun Instituto de modernaj lingvoj), kiu instruas, laŭ kiu lernolibro aŭ metodo, kaj kiom da personoj lernas.

La raporto pri nia landa kongreso en Liberec, okazinta en junio 1949, estas almetita al ĉi tiu numero, post kiam ni ricevis permeson kaj paperon.

La kvitanca glumarko por 1950 estos presita en unu el la venontaj numeroj. Ne postulu do ĝin de la Oficejo.

Pagante al la Asocio, notu sur la pagilo ĉiam klare, por kio la sumo estas destinita kaj ne forgesu citi ĉiam vian kompletan adreson.

Eksterlandaj Esperanto-revuo 1950. Librovendejo de EAĈSR informas kun bedaŭro, ke ĝi provizore ne povas akcepti novajn abononj al iu eksterlanda Esperanto-revuo kun sola escepto de Internacia Kulturo. Pri ĝi vidu apartan anoncon. La pagoj alvenintaj por Heroldo de Esperanto, Literatura Mondo, Esperanto-Tidningen, Malgranda Revuo k. a. restas je dispono de la pagintoj. Se la situacio ŝanĝiĝos, ni donos novan sciigon.

Novzelandaj filmo. Interesuloj, dezirantaj ĝin projekcii dum kluba vespero, en lernejo aŭ dum alia taŭga okazo, bonvolu sin anonci. La Asocio, kiu posedas plurajn kopiojn, pruntedonas ĝin rapide, regule tuj post ricevo de la peto. Ni atentigas tamen, ke estas filma strio 32 mm kun nemoveblaj bildoj kaj por ĝia projekcio sufiĉas plej simpla aparato. La bildoj surhavas anglajn tekstojn klarigajn, sed la Turisma Departemento de la Novzelandaj registaro disponigis al ni detalan esperantlingvan priskribon de ĉiu bildo, kiu estas legota dum la projekciado.

Aldono al la ĉeĥa-esperanta Filip-vortaro estas havebla ankaŭ aparte en nia Librovendejo po 2,80 Kĉs afrankite. Estas kvarpaĝa folieto enhavanta novajn esprimojn, necesajn en ĉiutaga vivo, kiuj ekestis lastatempe kaj mankis en la vortaro. Al ĉiu ekzemplero de la vortaro estas la folio aldonata.



La redaktanto dankas al ĉiuj, kiuj helpis lin dum la pasinta jaro, precipe al tiuj, kiuj sendadis sciigojn pri agado en siaj lokoj. En la nova jaro ni klopodos pli atenti la novajn samideanoj. En ĉiu numero aperos aparta pago dediĉita al ili.

Ni kore dankas al ĉiuj, kiuj bondeziris al ni okaze de Kristnasko kaj la Nova jaro. Ni deziras al ili kaj al ĉiuj membroj prosperon en la jaro 1950.  
C. Komitato kaj redakcio de EAĈSR.

## VIII-a ESPERANTO-KONGRESO ĈEĤOSLOVAKA

okazos

en BRNO la 27-28 MAJO 1950

Detaloj en la venontaj numeroj

\*

La slovakaj samideanoj informis nin en la lasta momento, ke ili ne povas aranĝi la kongreson. La Esperantista Klubo en Brno transprenis tiun taskon kaj jam energie eklaboris. Ni do faru ĉion, por ke la kongreso estu impona!

## Somera kolegio de Esperanto en Doksy 15.—29. VII. 1950

LKED uspořádá esperantské kursy pro začátečníky a pokročilé, kurs konverzační, řečnický, cvičný kurs pro učitele esperanta Cseh-metodou a seminář pro spolkové činovníky a kandidáty zkoušek. Na programu je též cyklus přednášek z esperantologie a esperantismu a cyklus esperantských přednášek o různých oborech kulturního života. V rámci společenských podniků je m. j. IV. letní karneval, III. Květinové hry, benátská noc na Máchově jezeře, řečnická soutěž o ceny, „Živé noviny“ a celodenní autokarový výlet.

Kursy v Doksech, jež se konají letos již po páté, mají své dobré jméno jak pro vyučovací metodu tak i přátelské prostředí. Každoročně stoupající počet žactva je jejich doporučením! Blíží informace najdete v příštích číslech časop. „Esperantista“ a „Verda Voĉo de Doksy“.

## INTERNACIA KULTURO

La bona revuo de danublandaj esperantistoj aperas en 1950 en 12 kajeroj grandformataj. Sendu abonon Kĉs 100,— tuj al poŝtĉeka konto 12371 de la Librovendejo de Esperanto-Asocio en ĈSR.

Právě vyšla podrobná J. V. Dolinského

## Velká slovenská učebnica medzinárodnej reči esperanto

Dodávame ji za Kĉs 65,— plus poŝtovné Kĉs 2,50.  
Objednejte složenkou číslo účtu č 12.371.

## Kdo je L. L. Zamenhof

Výborný spisek J. Šupichové o autoru esperanta a jeho dílu. — Nesmí chybět v knihovně žádného esperantisty. Za Kĉs 6,80 dodá knihkupectví Svazu. Kluby objednejte hromadně pro své členy!

# Elleerri 1-2

Ellerni znamená doučit se, důkladně se naučit. A to je programem těchto stránek, jež se budou objevovat v našem listě co možná pravidelně. Mají pomoci hlavně těm, kteří se naučili základům esperanta, aby v studiu vytrvali a pokračovali.

Naučte se této Zamenhofově básni:

## Mia penso

Sur la kampo for de l' mondo  
antaŭ nokto de somero,  
amikino en la rondo  
kantas kanton pri l' espero.  
Kaj pri vivo detruita  
ŝi rakontas komparente —  
mia vundo reŝrapita  
min doloras resangante.

„Ĉu vi dormas? Ho sinjoro,  
kial tia senmoveco?  
Ha, kredeble rememoro  
el la kara infaneco?“  
Kion diri? Ne ploranta  
povis esti parolado  
kun fraŭlino ripozanta  
post somera promenado!

Je to jedna ze dvou subjektivistických básní Zamenhofových. Všechny jeho básně je 9. Pět prvních (La espero, La vojo, Al la fratoj, Mia penso, Ho mia kor') je uveřejněno ve Fundamenta Krestomatio, jež vyšla 1903, ale všechny byly napsány daleko dříve. Al la fratoj vyšla v „La Esperantisto“ r. 1889.

## Bone kaj malbone

Sinjoro renkontis en la vojiro vilaĝanon. Vilaĝano, el kie vi estas? — De malproksime, sinjoro. — De kie, nome? — De vilaĝo apud Rostov. — Ĉu ĝi estas granda? — Mi ĝin ne mezuris. — Kion vi faris tie? — La pasintan jaron mi tie aĉetis sakon da pizoj.<sup>1)</sup> — Bona afero! — Bona, sed ne tre! — Kial? — Mi ebrigi<sup>2)</sup> kaj disŝutis mian aĉetaĵon.<sup>3)</sup> — Malbona afero! — Malbona, sed ne tre! — Kial? — Mi disŝutis<sup>3)</sup> unu sakon kaj rekolektis unu kaj kvaronon. — Bona afero. — Bona, sed ne tre! — Kial? — Mi semis la pizojn, sed la rikolto estis malriĉa. — Malbona afero. — Malbona, sed ne tre! — Kial? — Da pizoj mi ricevis malmulte, sed da pizŝeloj mi akiris multe. — Bona afero. — Bona, sed ne tre! — Kial? — La porko de nia popo venis en la pizplantejon<sup>4)</sup> kaj difektis ĝin. — Malbona afero. — Malbona, sed ne tre! — Kial? — Mi mortigis la porkon kaj el ĝi ricevis bonan porkaĵon. — Bona afero. — Bona, sed ne tre! — Kial? — La hundoj de l' popo kutimis ŝteli mian porkaĵon. — Malbona afero. — Malbona, sed ne tre. — Kial? — Mi mortigis la hundojn kaj faris el ilia felo<sup>5)</sup> pelton<sup>6)</sup> por mia virino. — Bona afero. — Bona, sed ne tre! — Kial? — Mia virino paŝis antaŭ la domo de l' popo, li rekonis la felon kaj forprenis la pelton. — Malbona afero. — Malbona, sed ne tre! — Kial? — Mi portis plendon al la tribunalo, kaj la popo estis kondamnita redoni la pelton. — Bona afero. — Bona, sed ne tre! — Kial? — Por gajni l' aferon, mi estis devigata doni al la juĝisto mian bovinon.

Poznámky, abyste vůbec nemusili hledat ve slovníku ani se příliš namáhat: <sup>1)</sup> hrách, <sup>2)</sup> nákup, <sup>3)</sup> rozšypal, <sup>4)</sup> hrachoviště, <sup>5)</sup> kůže, <sup>6)</sup> kožich.

Tuto ruskou lidovou povídku přeložil A. Kofman (1862 až 1906) jeden z prvních ruských esperantistů, a je na počátku „Esperantaj prozaĵoj“, které vyšly v Kolekto aprobita de D-o Zamenhof. Není nevtipná, přečtete-li si ji pozorně dvakrát, můžete ji vypravovat zpaměti; snažte se ji vypravovat co možná doslovně, bude to cvičení velmi efektivní, získáte-li oddané posluchače. Všimněte si též, jak toto esperanto, staré asi padesát let, zní zcela jako texty dnešní. Jak živá je esperantská tradice jazyková!

## První úkol

Přeložte těchto 10 vět, jež jsou polovicí textu, daného svazovou zkušební komisí při zkouškách z jazykové znalosti esperanta:

1. Řekni mu, aby přišel až večer. 2. Řekni mu to hned, aby to věděl včas. 3. Městečko má tisíc obyvatel. 4. Zdědil milion dolarů. 5. Přesvědčil mne, že má pravdu. 6. Světelný paprsek. 7. Několik svítících lamp. 8. Lživá informace, lhavé dítě. 9. Sklenice vína, vinná sklenice. 10. Šel lesem. — V příštím čísle bude uveřejněn překlad.

K prvnímú plesu esperantistů v Karlových Varech 14. ledna 1950 zaslal jeden stařec tento slogan:

Dancu en la paroj ĝee  
Amindumu korifee  
Sed ne amu laŭidee  
Kaj nenion pentu vee.

Bálovníci prostudovali slogan a pověřili mladého muže odpovědi, jež zněla:

Sabate dancis ni senĝene,  
dimanĉe drinkis ni festene,  
sed lunde bruis kap' malbene.

Stařec zaradoval se nad touto pěknou básní i nad tím, jak dobře bylo porozuměno jeho radám, ale zesmutněl:

Lerninto la majstron superos  
kaj majstro pro envio suferos  
ĉar junular' lin jam nur toleros.

Ale starcova organizační vášeň přece jen zvítězila a nadchla ho ještě k veršům didaktickým:

Martoj estas la plej gravaj tagoj,  
ĉar post lundaj kapoplagoj  
vokas vin al verdaj agoj.

Úplní začátečníci věztež, že samideáni často chtějíce se napomenout, aby se mluvilo esperantsky, říkají si Parolu verde!

## Dialogo skoltisma.

— Ni prezentas nin, fratulo subĉefo, plenuminte bonan faron. Ni kondukis maljunan sinjorinon trans bruon straton.

— Brave, knaboj, Sed ĉu vi ĉiuj tri estis necesaj?  
— Ŝi ne volis ja iri.

## Malgranda ŝerco.

Knabeto venas en vendejon kaj diras: „Mi deziras kolumon por mia patro“.

Vendisto: „Tian, kiel estas la mia?“  
Knabo: „Ne, puran!“

## Virto.

— Se mi vidus homon, kiu batas azenon, kaj mi ĉesigus lin, kiun virton mi praktikus?  
— Fratamon!

Nebudeme na těchto stránkách pokračovacího kursu příliš pěstovati verše, jak by se mohlo souditi z této stránky. Na následující straně předkládáme k pozornosti humoru starého japonského autora Tokuchi Kodo v překladu J. Kimry, jak byl uveřejněn v Japana Esperantisto roku 1908.

## Du sake\*) vendistoj

He! Haĉiko, ĉu vi estas dome?  
Ĉu Vi? Amiko Kumako! Enirul  
Kia bela printempa vetero!  
Jes, beleĝa.

Multaj homoj iradas admiru ĉerizflorojn. Kial vi restadas dome en tia sezono?

Ve! Mi estas iom honta diri al vi, mia kunfrato, ke mi ne havas eĉ unu senon.\*\*\*) Kaj kun senenhava monujo, nenie troviĝas plezuro, mi do restadas dome fumante kiel teokruĉo!

Ne, tio estas sensencaĵo! Ni kuniru admiru ĉerizflorojn en Mukojima.

Kiel mi diris al vi, mi ne povas eliri...  
Sed post 4 aŭ 5 tagoj ne restos plu floroj!  
Mi tion bone scias. Sed ve!...

Mia poŝo ankaŭ estas malplena kiel la via. Sed post longa medito mi fine elpensis bonegan metodon gajni monon admirante la florojn.

Ho, ho! Kaj kiel?

Pro tio mi venis vin voki. Ĉu vi ne venos kun mi? La afero postulas du homojn.

Jes, jes, tre volonte! Kaj kio estas mia rolo?

Ĝi estas tre simpla! Mi petis sake-vendejstron prunte doni unu bareleton da sake. Ni alportu ĝin al Mukojima kaj vendu ĉiun glason po dek senoj.

Bonega ideo! Jes, des pli sake malmultiĝas, ju pli sake-amanto volas ĝin havi; kaj ili aĉetos eĉ po dek senoj.

Mi portis unu moneron de dek senoj por la okazo, ke oni pagos al ni per monero de dudek senoj.

Ha, mia amiko, vi estas multe pli saĝa kaj pli riĉa ol mi, ĉar mi ne havas eĉ dek senojn!...

Nu, ni iru!

Jes, jam multaj gajuloj kantas kaj dancas sub la floraro; al ili jam sake mankas. Ni iru kiel eble plej baldaŭ!

Ni multe gajnos kaj poste, reveninte domen, ni drinkegos ĝis sateco.

Jes, post laboro ridetas ĝojo. Nun mi estas tute preta. Ni do ekiru!

Vi iru antaŭe.

La du amiko, ambaŭ drinkemuloj, iris al Mukojima, portante la barelon sur siaj ŝultroj per bastono.

Ha ĉiko. Vidu Kumako! Kia amaso da homoj! Kiel gajaj estas tiuj ebruloj! Vere la gusto de sake estas nekomprenbla por tiuj kiuj ne amas ĝin, ĉu ne?

K u m a k o. Ĉesu, ĉesu diri tian kruelaĵon!

H. Kruelaĵo? Kial?

K. Ĉar vi vekas infanon pace dormantan.

H. Klarigu, mi tute ne komprenas vian diron.

K. Por vi, kiu marŝas antaŭ mi, estas nenio; sed por mi, kiu sekvas la barelon — bonega odoro de sake alvenas kaj eniras ĝis la fundo de mia elsekigita ventro...

H. Ha, vere mi ne pensis pri tio, senkulpigu min!

K. Aa! Mi eksentas min malsana... Kion vi diras, mia kunfrato, pri tio se...

H. Kion vi deziras?

K. Nia sake estas vendaĵo, do ne estas prave trinki ĝin senpage! Sed se mi pagos dek senojn por glaso... estos nenia malpraveco pro tio, ĉu ne estas vere?

H. Jes, prave.

K. Se jes, mi volus trinki unu glason por trankviligi mian malsaneton.

H. Nia sake estas vendaĵo; do vendi al tiu aŭ alia homo estas tute same. Ĉiu estas kliento!

K. Do, jen dek senoj, prenu la monon kaj donu al mi unu glason!

H. Vi estas bonvenanta, sinjoro! Mia sake estas de la plej bona kvalito.

K. (trinkante). Ho, jes, vi estas prava! Estas bonege! Kia bongusto!... Nun mi estas tute resanigita; ni do ekiru! (Ili ekmarŝas.) Aa, mi sentas min tre gaja! La gusto de

sake estas ĉiam nedirebla!... He! amiko, kiel vi estas? Ĉu vi estas iom malsana?

H. Se vi trinkis kaŝe de mi...

K. Kaŝe? Kial?

H. Enversinte sake'n por vi kaj vidante vin eltrinkantan, mi fariĝis iom malgaja... Nia sake estas vendaĵo. Do, kion vi diras, se mi pagos dek senojn por glaso? Tiel mi estos kliento kiel iu alia, ĉu ne estas vere? Sed mi ne trinkus iom, mi ekfariĝus freneza!

K. Bone, bone! Komercisto vendas al iu ajn. Nur pagu dek senojn kaj vi ĝin havos.

H. Jen estas (pagas al K. kaj trinkas)! Ha, ha, bonege! Kia gusto! Via sake estas de la unua kvalito.

K. Jes, sinjoro. Mi petas vian estontan favoron.

H. Ha, ha! Vi fariĝis bona vendisto. Nu, ekiru!

K. Haltu, mi petas.

H. Kion vi diras?

K. Pli bone estus, se mi estus neniom trinkinta.

H. Kial do?

K. Ĉar mi trinkis nur unu glason, kaj nun mi sentas min pli soifa, pli malsana ol antaŭe... Mi ne povas plu kunporti la barelon kun vi, amiko mia!

H. Tio estas makonvena. Se ni ne alvenos ĝin Mukojima, ni ne povos gajni tion, por kio ni drinkados tiun ĉi nokton. Resaniĝu, mi petas. Ĉu vi volas ke ni ripozu iom?

K. Ne, ni ne perdu tempon ĉi tie. Amiko, vendu al mi ankoraŭ unu glason kaj mi tuj resaniĝos... mi fariĝos kapbla kunporti nian barelon.

H. Se la sake estas tiel efika por via resaniĝo, prenu ĝin.

K. Jen estas dek senoj! Plenu la glason ĝis la bordo (trinkas)! Nun mi estas sanega, fortega! Ni iru antaŭ ol la popolamaso disiros.

Ambaŭ vendistoj marŝas apenaŭ cent metrojn.

H. Haltu!

K. Kio okazas?

H. Vi marŝas tro rapide, kaj mi havas ventrodoloron. Mitrinkis nesufiĉan kvanton da sake, kaj mi pensas, ke mia stomako parte malsekiĝis sed parte restas ankoraŭ tute seka, kaj pro tio mi havas ventrodoloron... Jen dek senoj! Donu al mi por trinki!

H. Tre volonte!

Tiamaniere niaj ambaŭ vendistoj trinkadis unu post la alia ĝis ili alvenis Mukojima'n. La barelo fariĝis tre malpeza kaj ili tute ebraj.

H. He! Gesinjoroj, pardonu!... Kunulo, kie ni malfermos nian butikon?

K. Tie ĉi sub la beleĝa floraro! Ĉiuj trovos nian butikon kaj alvenos amase.

Ambaŭ ebruloj sidiĝas sub ĉerizarbo kaj kriadas laŭte. Sinjoro, jam sufiĉe ruĝa, alvenas por replenigi sian eltrinkitan botelon.

K. Ho! Sinjoro, vi estas bonvenanta! Nia sake estas tre bongusta.

Kunulo, mezuru la sake'n pli rapide kaj plenu la botelon al tiu ĉi sinjoro... Pli klinigu la barelon... Kion vi faras?

H. Ho ve, amiko! Ni jam vendis la tuton, plu ne restas eĉ guteto.

K. Sinjoro, ni tre bedaŭras ke ni ne havas plu da sake; ĝi estas jam elvendita.

La sinjoro foriras.

H. Nun, nia afero iris pli rapide kaj sukcese ol ni antaŭe supozis! Ni do kalkulu la tutan sumon, kiun ni gajnis.

K. Jes, bone, jen vi vidas!

Li renversas sian monujon, nur unu monero de dek senoj elfalas.

H. Tio estas stranga! Serĉu ankoraŭ. Nia vendaĵo estas tute elvendita kaj ni ne havas pli ol dek senojn!

K. Jes, mi komprenas, nenio stranga!

H. Nenio stranga?

K. Pripensu bone. La unuan fojon mi aĉetis la sake'n pagante al vi dek senojn, due vi pagis, trie mi k. t. p. ĉiam donante kaj redonante tiun saman moneron inter ni reciproke, kaj dume la tuta sake estis eltrinkita!

H. Ha, ho jes! Mi komprenas! Ni nur ne povis multe gajni, sed ni ankaŭ neniom perdis, ĉar ni havas ĉiam la moneron de dek senoj!

Tradukis J. Kimra.

\*) Saké (vino) estas la plej komuna ebriga trinkaĵo de Japanoj, farita el rizo.

\*\*) Japana mono.